Jarkolekto 16 Kvarmonata N-ro 3, 1986

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Bociort, I. (R)
Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Kiselman, K. (S)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)
(redaktisto)

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK H-1364 Budapest, Pf. 107

Presado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antwerpen

Enhavo

POST LA DUDEKA

La malfermo 1

Laŭtema programo 3

Resume 7

ILEI-membroj 1976-1985 (B. Andreasson) 9

KONFERENCAJ PRELEGOJ

Gérard R. – *Komputiloj en instruado* 10

INSTRUMETODOJ

Cseh-metodo: Kelkaj konsiloj al instruantoj 23

Instrumetodaj gvidlibroj 29

LINGVISTIKO

Tangerud O. – *La norvega lingvo* 30

FORUMO

Ĉu ekzistas "hungarsperanto"? (sz-i) 38

RUĜA KRAJONO 40

AKTUALAĴOJ

okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj 42

LIBROBRETO 49

ALVOKOJ 53

Jarkolekto 16 **oktobro 1986** **N-ro 3, 1986**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj eĉ rekomendataj kune kun fontindiko.

Post la 20-a

LA MALFERMO



De maldekstre: M. Bacev, vicsekretario — B. Andreasson, estrarano pri financoj — C. Dazzini, ĝenerala sekretario — G. Maertens, prezidanto de UEA — I. Szerdahelyi, prezidanto de ILEI — (duonkovrita) E. Symoens, vicprezidanto de ILEI

La prezidanto de UEA salutas la Konferencon:



La 20-an Konferencon ĉeestis 69 konferencanoj el 13 landoj.

M. Bacev, la vicsekretario de ILEI, salutas la Konferencon je la nomo de sia lando (Bulgario):



Laŭtemara programo

I. ORGANIZAJ TEMOJ			
1. Estrarkunsidoj	07-11	18:00-20:00	2 horoj
	07-12	10:00-12:00	2 horoj
		16:00-18:00	2 horoj
	07-14	16:30-18:00	1:30 horoj
	07-17	20:00-23:00	3 horoj
	07-18	16:00-18:00	2 horoj
2. Diskutoj pri	07-14	09:45-12:45	3 horoj
labor-dokumentoj	07-15	09:45-12:45	3 horoj
	07-17	09:45-12:45	3 horoj
3. Komitatkunsido	07-18	09:45-12:30	2:15 horoj
4. Ĝenerala kunveno	07-18	14:30-16:00	1:30 horoj
		Entute:	25:15 horoj

II. PEDAGOGIO - DIDAKTIKO - LINGVISTIKO			
1. Lernej-politiko	07-13	14:30-16:00	1:30 horoj
	07-14	14:30-16:00	1:30 horoj
2. Pac-edukado	07-13	10:30-11:30	1 horo
3. Metodiko	07-14	16:30-18:00	1:30 horoj
	07-15	14:30-16:00	1:30 horoj
		16:30-18:00	1:30 horoj
	07-17	16:30-18:00	1:30 horoj
4. Lingvistiko	07-17	14:30-16:00	1:30 horoj
		Entute:	11:30 horoj

La pedagogoj lernas la manipuladon de mikrokomputiloj sub la gvidado de Ray Gérard (staranta antaŭ la tabulo en blanka ĉemizo kaj kravato):



III. KULTURPROGRAMOJ, EKSKURSOJ, AMUZIĜOJ

1.	Pri Belgio	07-13	20:00-21:30	1:30 horoj
	F. Liszt-vespero	07-15	20:00-21:30	1:30 horoj
2.	Interkona vespero	07-12	20:00-21:00	1 horo
	Adiaŭa vespero	07-18	20:00-21:30	1:30 horoj
3.	Ekskursoj	07-14	20:00-22:00	2 horoj
		07-16	09:00-21:00	12 horoj
		07-17	20:00-22:00	2 horoj
4.	Libera posttagmezo kaj butikumado	07-18	16:00-18:00	2 horoj
			Entute:	22:30 horoj

La kongresanoj dum la ekskurso en Gembloux:




Rim.: La detalan kronologian programon vidu en IPR 1986/2, pĝ. 39-40.


Ne enestis en la programo:
07-13, posttagmeze:
M. Kovács (H): La historio de la lastaj 10 jaroj de ILEI/IPR;
G. Sossois (B): Didaktikaj ludoj kaj ludiloj;
07-15, A. Staes (B): La lerneja projekto de UEA;
07-17, Ray Gérard (B): Komputiloj en instruado (16:30-18:00).

Novaj Honoraj Membroj de ILEI:

Marcel Erbetta (CH), Irja Klemola (SF), Olle Olsson (S), kaj Jozef Toczynski (PL).


Olle Olsson je la nomo de la novaj Honoraj Membroj dankas pro la honorigo:





Dum la **ferma kunsido** la Ĝenerala Sekretario laŭtlegas la koncizan raporton pri la Konferenco. La tekston de la Raporto ricevis ĉiuj sekciestroj kun la tasko diskonigi ĝin inter la membroj de la landaj sekcioj.

La prezidanto de UEA, G. Maertens, ĉeestis ankaŭ la ferman kunsidon. En sia adiaŭa parolado li promesis raporti kaj al la malnova kaj al la elektota nova Estraro de UEA en Pekino pri siaj pozitivaj spertoj:



Resume:


- Laŭ la ĝenerala opinio de la partoprenintoj, la 20-a Konferenco plenumis tiujn celojn, kiujn ĝi antaŭvidis.
- La materialo de la Konferenco koncentriĝis ĉirkaŭ la internaj problemoj de la Ligo. Tio estas motivigebla per la fakto, ke estis la unua konferenco, organizita de la nova Estraro, kiu intencas parte daŭrigi, parte renovigi kaj en certaj temoj ŝanĝi la ĝisnunan situacion.
- Krom la organizaj demandoj okazis altnivelaj fakaj prelegoj pri diversaj pedagogiaj-metodikaj-lingvistikaj temoj.

- Ne mankis en la programo ankaŭ kulturaj eroj, kiuj kontribuis al la plivastigo de la konoj de la ĉeestantoj.
- Estis aranĝitaj tri ekskursoj por pli proksime ekkoni la gastigantan landon.
- La Konferenco havis vastan diskonigon pere de du televidaj kaj du radio-dissendoj, krome aperis informaĵoj en pluraj flandraj kaj franclingvaj ĵurnaloj.
- La programo estis iom streĉa kaj laboriga, sed estas ĝojige, ke la plej granda parto de la ĉeestintaro tre aktive kunlaboris.
- La Konferenco havis ankaŭ mankojn, kiujn la Estraro devas profunde analizi por povi ilin estonte eviti. Estas bedaŭrinde, ke ĉeestis malmultaj sekciestroj.

La Redakcio

(Fotoj: Lidia Neri Lami)

I.L.E.I. — MEMBROJ 1976–1985



(Estrarano pri Financoj: Bertil Andreasson)

Konferencaj Prelegoj

KOMPUTILOJ EN INSTRUADO*

Ray GÉRARD

Enkonduko

La memorado de faktoj povas esti akcelita per la uzo de komputilo. La programo, kiun mi jene priskribos, estas bone adaptita por la lernado de fremdaj lingvoj.

Grava kvalito de la sistemo estas ke ĝi permesas facile enkomputiligi la memorendaĵojn.

Bezonata materialo

IBM-PC-simila komputilo kun: ekrano televidosimila, klavaro, disketlegilo, 64 K memoro, disketo entenanta la programon kaj la lecionojn.

Manipuloj

Oni enŝovas la disketon en la fendon de la legilo, enŝaltas la aparaton, kaj atendas la aperon de la unua menuo sur la ekrano. De tiam, oni sekvas la direktivojn donitajn sur la ekrano por elekti la lernotan lecionon inter la diversaj eblecoj.

Supraĵa priskribo de leciono

La unua ekranteksto kutime prezentas la lecionon: kion kaj kiel oni lernos. Poste komenciĝas la vera memorigado.

Frazo aperas sur la ekrano. Mankas en ĝi vorto aŭ parto de vorto. La lernanto provas plenigi la mankantan informon. Sed ĉar li ne konas

* La prelego okazis la 17-an de julio 1986, je la horo 16:30-18:00, dum la 20-a Konferenco. Adreso de la aŭtoro: Antwerpsesteenweg 24, B-2250 Broechem (Belgio).

la ĝustan respondon, plej ofte li eraras. Tiam la tuta frazo aperas sur la ekrano. Kiam la lernanto finlegis la respondon, li premas iun klavon, kaj li rericevas la saman truhavan frazon. Espereble, li ankoraŭ memoras kion respondi. Se li respondas bone, li ricevos novan demandon. La unua demando tamen estos refarita poste, por plifortigi la memoradon. La ofteco de la redemandoj dependas de la malfacileco de la memorendaĵoj.

Bonvolu relegi la ĉi-supran alineon kaj poste la unuan frazon de ĉiu alineo sube; tiam unue legu tion, kio plej interesas vin.

Ĉu vi vere relegis la antaŭan alineon?

Verŝajne ne! La plimulto el ni ne havas sufiĉe da tempo por atente sekvi la donitajn direktivojn, eĉ se tio ne daŭras minuton. Ankaŭ kiam oni skribas perkomputilan kurson oni ne povas fidi ke la uzanto legos ĉion sur la ekrano. Tamen komputilo havas avantaĝon super libro.

Kiun avantaĝon havas tiu ĉi sistemo super libro?

La adaptebleco de libro al lernanto estas minimuma. Aŭ ĝi progresas tro rapide, aŭ tro malrapide. Fakte la lernanto devas adaptiĝi al la libro. Kontraŭe, komputilo povas ja adaptiĝi. Kiam mi diras "komputilo", komprenu "komputilo kaj la programaro por funkciigi ĝin".

La komputilo povas kontroli ĉu la lernanto asimilis la informon antaŭ ol daŭrigi kun nova lernotaĵo.

Kial uzi tru-frazojn?

Mi klarigos per ekzemplo. Prenu la informon: *Parizo estas la ĉefurbo de Francio.* — Mi povus demandi: *Kiu estas la ĉefurbo de Francio?* — La lernanto devos respondi: *Parizo.* — Oni bezonas ankaŭ kontroli ĉu li konas la informon alidirekten. — Mi plu demandu do: *De kiu lando, Parizo estas la ĉefurbo?* — Nun, se mi volas ricevi la respondon

"ĉefurbo", kiun demandon mi faru? — Provu mem. Ne estas evidente. Se mi uzas tru-frazon, mi povas tre facile fari la jenajn demandojn:

..... estas la ĉefurbo de Francio.
Parizo estas la ĉefurbo de .....
Parizo estas la ..... de Francio.
Parizo estas ..... ĉefurbo de Francio.
Parizo est..... la ĉefurbo de Francio.
Parizo estas ..... ĉefurbo ..... Francio.

Mi estas multe pli produktiva. Mi nur bezonas tajpi la lernotan tekston, ripeti ĝin kiom necesas, kaj kaŝi la partojn kiujn oni volas memori. Mi ne perdas tempon vortigante la demandojn.

Ĉu oni povas uzi nur tru-frazojn?

Oni ĉiam devas provizi mankantan informon. Oni povas ekzemple demandi:

Ligu la landon al ĝia ĉefurbo:

A. Parizo	*1. Svislando*
B. Bruselo	*2. Francio*
C. Berno	*3. Belgio*

A = ... *B = ...* *C = ...*

Mi ne konsilas tiun prezentadon. Se la listo estas tro longa, la lernanto perdas multe da tempo respondante al demandoj kiujn li jam konas.

Ĉu oni prezentas unue la lernotan materialon antaŭ ol fari la demandojn?

Oni kutime komencas lecionon per kelkaj ekrantekstoj da klarigoj pri la lernota materialo, la celo de la leciono, kaj la maniero por respondi la demandojn.

Ekzemple, se la leciono pritraktas la Esperantan gramatikon, oni povas doni resumon de la gramatikaj finaĵoj. Se la leciono temas pri la vortaro, oni povas prezenti la liston de lernotaj vortoj sur la unuaj ekrantekstoj.

Al kio tio utilas? Oni ne esperu ke la lernanto memoros ion post la unua eklerno! Pli utilas refarigi jam lernitan lecionon kies materialo estas plimalpli konata. Tiam li povas facile kontroli ĉu li ĝuste memoras, kaj eble decidi ke ne necesas refari la (tutan) lecionon.

Ekde kiu aĝo oni povas lerni per tiu metodo?

Ekde kiam oni kapablas legi. Tamen adolto devos montri al infano kiel manipuli la aparaton kaj li devos ankaŭ konforme al la aĝo adapti la parametrojn de memorigado.

Ĉu oni certas ke la lernanto vere memoras kion oni instruis al li?

Ne. Oni devas bone kontroli la efikon de la kurso. Mi konstatis plurfoje ke lernanto tute ne legas la demandon antaŭ ol respondi. Tio okazas se la formo de unu demando malsimilas la aliajn. Ekzemple, se ĉiu demando estas unulinia, escepte unu kiu estas dulinia, tiam la lernanto ne atente relegos tiun unikon frazon, sed tamen respondos ĝuste. Same, se la kaŝita vorto mankas, kaj li ricevas du-truan frazon.

Ĉu oni bezonas esti instruisto por skribi tian kurson?

La unua celo de la programo estas helpi la gepatrojn kontroli la progresojn de siaj infanoj. Se la leciono jam ekzistas surpapere, ili bezonas nur entajpi ĝin en la komputilon, aldonante, kie necesas, kontrolsignojn ĉirkaŭ la partoj kaŝotaj.

Kompreneble, instruisto pli bone komprenas la avantaĝojn de la sistemo, kaj ankaŭ supertaksos ĝiajn eblecojn; sed oni povas akiri sufiĉan sperton sen esti instruisto.

Krei novan kurson, bele prezentitan, estas pli malfacila tasko. Kiel precize tion fari estas klarigita aliloke.

Ĉu la demandoj aperas laŭ hazardo aŭ ĉiam laŭ la sama vicordo?

Ambaŭ metodoj eblas. Estas pli facile memori strukturitajn informojn. Se ekzemple oni volas lerni la Esperantajn korelativojn, oni ler-

nos ĉu laŭ vicigo (1): *kiu, iu, neniu, ĉiu, tiu – kio, io, nenio, ĉio, tio – kie, ie, nenie, ĉie, tie,* ktp.; aŭ laŭ vicigo (2): *kiu, kio, kie, kiam, kiom, kies, kia – iu, io, ie, iam, iom, ies, ia – neniu,* ... ktp.

Sed lerni laŭ strukturo, eĉ komprenante ĝin, ne estas sufiĉe. Strukturo estas apenaŭ pli efika ol mnemoniko (parkeriga vorto aŭ sentenco). Necesas refari la samajn demandojn laŭ hazardo, por kontroli la profundecon de memorado. Tion faras la programo aŭtomate: kiam la lernanto alvenis je la fino de leciono, kaj deziras daŭrigi, la demandoj tiam tamen reaperas sed laŭ alia vicordo.

Oni devos eksperimenti por scii kio okazas. Mia impreso estas ke, se oni lernas laŭ vicigo (1), oni facile konfuzas la finaĵojn *iu, io, ie, ial, iam, iom, ies, ia.* Se oni lernas laŭ vicigo (2) oni facile konfuzas la prefiksojn *k-, t-, nen-, ĉ-.* Laŭ la vico (1) oni pli rapide alvenas al la fino de la leciono ol laŭ vico (2), sed oni memoras malpli.

Mi esperas, ke iu el la legantoj provos kontroli tiun impreson. En la kazo de la korelativoj, la plej rapida lernmaniero estas lerni unue laŭ vicigo (1), poste (2), kaj fine laŭ la hazardo (intermikso).

Kiel la komputilo povas scii kiam redemandi ion?

La arto estas refari iun demandon precize je la momento kiam la lernanto estas forgesonta la respondon.

Tian "dian" algoritmon oni serĉos ankoraŭ longe. Oni devas ja konsideri la memorkapablon de la lernanto, lian laciĝemon, la malfacilecon de la leciono, kaj diversajn eksterajn influojn ĝenajn. Oni devas do akcepti malpli perfektan solvon, kiu estas ne tute aŭtomata. Mi provizore uzos simplan algoritmon kaj ni vidos ĉu ĝi funkcias kontentige.

Supozu ke la lernanto volas lerni la 16 unuajn literojn de la latina alfabeto. Li devas respondi al demandoj kiel: *Kiu estas la unua litero de la alfabeto?* Ĉar li ankoraŭ nenion scias pri tiu alfabeto, li ĉiam eraras kiam li ricevas novan demandon. Sed poste, se li posedas bonan memorkapablon, li ĉiam bone respondos.

Supozu, ke li ricevas la demandojn laŭ la vico: A, B, C, D, E, F, G, H, I, J, K, L, M, N, O, P, kaj ke la parametroj de memorigado estas: 1, 2, 4, 8, 0 (t.e. 2^0, 2^1, 2^2, 2^3, 0). La cifero 1 signifas ke (post eraro) la demando estas tuj refarenda. Poste ĝi prenos la duan lokon en la vico. Kaj se la lernanto bone respondos, ĝi prenos sinsekve la kvaran kaj la okan lokojn. Se li ankoraŭfoje ĝuste reagos, tiam la demando iros al la fino de la demandaro. Ĝi estos tiel konsiderata kiel konata.

Konkrete, oni demandas A. — La lernanto eraras. — Oni redemandas A. — La lernanto respondas A. — Nun la nova sinsekvo fariĝas: B, A, C, D, E, F ... Oni do demandas B. — La lernanto eraras kaj rericevas B. — Li nun respondas ĝuste B. — La nova vico estas denove ABCDEF ...

La samon aliel prezentita:

Demando	**Respondo**	**Nova loko**	**Nova vico de la demandaro**
A	—	1	ABCDEFGHIJKLMNOP
A	A	2	BACDEFGHIJKLMNOP
B	—	1	BACDEFGHIJKLMNOP
B	B	2	ABCDEFGHIJKLMNOP
A	A	4	BCDAEFGHIJKLMNOP
B	B	4	CDABEFGHIJKLMNOP
			kaj tiel plu ...

Oni povas kontroli ke la demandoj aperos laŭ jena vicigo:
(Minusklo signifas ke la lernanto malĝuste respondis, majusklo ke li ĝuste respondis.)

a	A	b	B	A	B	c	C	d	D	C	D	A	B	C	D
e	E	f	F	E	F	g	G	h	H	G	H	E	F	G	H
A	B	C	D	E	F	G	H								
i	I	j	J	I	J	k	K	l	L	K	L	I	J	K	L
m	M	n	N	M	N	o	O	p	P	O	P	M	N	O	P
I	J	K	L	M	N	O	P								

Ĉu oni povas ŝanĝi la parametrojn de memorado?
Kiam la memorendaĵoj estas tre malfacilaj, la jenaj valoroj estas pli taŭgaj: 1, 2, 3, 4, 5, 10, 0. La demandoj estos refaritaj pli frue.

Se la teksto estas tre facila, oni povas uzi 3, 8, 0. La kursoskribisto povas difini kelkajn nivelojn de memorado, kaj la lernanto povos mem elekti la plej taŭgan por si.

Kiam vi difinas la valorojn, bone notu ke tedas la lernanton ripeti la samajn respondojn sencele.

Mi konstatis ke en okazo de erara respondo, estas pli bone supozi ke la lernanto tute ne rimarkis la respondon. Tio signifas, ke la rememorigo fiaskis; ke ĝi estis farita tro malfrue. En la raraj okazoj kiam oni ne deziras rekomenci ĉion, oni povas ankaŭ difini kio okazos post eraro.

La programo enhavas la plej ofte uzatajn valorojn, sed kiel mi jam diris, la kursoskribisto povas doni pli taŭgajn valorojn kiuj rilatas al la malfacileco de la leciono. Kaj la finan respondecon pri tio havas la lernanto mem, ĉar li povas ŝanĝi la valorojn se li opinias ilin maltaŭgaj. Se la lernanto estas infano, la gepatroj mem devos adapti la parametrojn al ĝia memorkapablo.

Se la lernanto plej ofte ne scias la respondon al nova demando, kial ne doni la respondon tuj?
Tio efektive estos pli efika kiam la demandoj estas tre malsimilaj.

Fakte, en leciono oni prezentas plurfoje la saman materialon. Ekzemple, se mi volas instrui la gramatikajn finaĵojn, mi donas plurajn ekzemplojn pri *-o, -oj, -on, -ojn,* ktp. Se la lernanto komprenis la sistemon, li respondas ĝuste al nova demando.

Aliflanke, mi ne certas ke la lernanto ankoraŭ ne konas la lernotan materialon, ĉar eblas ke li jam lernis la lecionon antaŭe. Kiel kutime, la solvo de tiu problemo kuŝas ĉe la uzanto mem. En la fina eldono de la programo, la lernanto elektos mem ĉu li deziras tuj ricevi la respondon al nova demando, aŭ ne.

Kiom da tempo daŭru leciono?
Mi konstatis ke infano 11-jara kapablas labori dum 3 horoj antaŭ la ekrano sen paŭzi, sed tio estas malkonsilinda. Se la lecionoj daŭras 15 minutojn, la lernanto povos tralabori ĝin dufoje: unue laŭ la normala vico, due laŭ la hazardo. La lernanto havas ankaŭ la impreson ke li pli rapide antaŭeniras, kiam longa leciono estas dividita en pluraj mallongaj. Se tamen leciono estas tro longa, la lernanto povas interrompi ĝin kaj konservigi la atingitan memorstadion.

Ĉu indas refari jam lernitan lecionon?
Tio estas avantaĝo de la sistemo. Entajpita leciono povas esti refarita, ekzemple antaŭ la ekzamenoj. Bona leciono kvazaŭ renoviĝas kun la tempo, nome kiam mi skribas lecionon aŭ aldonas al la lernota materialo kelkajn akcesorajn informojn, kiujn la lernanto ne devas memori, kaj do facile forgesos.

Kiom da provoj oni rajtas fari antaŭ ol la komputilo donos la ĝustan respondon?
Nur unu. Tuj kiam oni povas supozi ke la lernanto eraris, oni haltigu lin. Mi unue donis 3 eblecojn plibonigi, sed konstatis ke tio estas tempoperdo. En la fina eldono de la programo la komputilo donos la ĝustan respondon se la lernanto ne reagis post 3-5 sekundoj.

Nun, kio pri tajperaro? Kiam oni premas sur malbona klavo, oni plej ofte tuj rimarkas tion. Estus agrable se oni povus korekti la ĵus tajpitan literon. Tio bedaŭrinde ne eblas por unuliteraj respondoj, kaj mi precize konsilas uzi, kiam eblas, unuliterajn respondojn. Tamen la eblecon korekti mi programos poste. La lastan literon oni neniam povos korekti.

Kiom da truoj oni povas lasi en frazo?
Kiom da oni deziras. Mi konsilas nur unu. Se estas pluraj memorotaj informoj en frazo, ripetu ĝin tiom da fojoj kiom da memorendaĵoj enestas.

Ĉu oni bezonas unue lerni tajpadon antaŭ ol oni povos uzi la komputilon?

Tio helpas. Lernanto kelkfoje havas malfacilaĵojn trovi la ĝustan klavon. En la lecionoj kiujn mi pretigis por demonstrado, mi plej ofte enigas aŭtomate la mankantan vorton ekde kiam la lernanto tajpis ties unuan literon. Mi ankaŭ pretigis kurseton pri la uzo de la programo, per la programo mem. Mi aldonos kelkajn ekzercojn rilate al la klavaro.

Oni ne pretervidu la gravecon de bona enkonduko. Se la komputilo aspektas fremda, la leciono certe fiaskos.

Ĉu oni povas lerni la tradukon de longaj frazoj?

Supozu ke oni volas traduki frazon kiel: *Estas ege malfacile traduki longajn frazojn.* — La problemo estas, ke tiu frazo povas ankaŭ tradukiĝi kiel: *Estas malfacilege traduki longajn frazojn* aŭ *Traduki longajn frazojn oni povas tre malfacile.*

Per tiu ĉi metodo oni povas prezenti la tradukon tiel ĉi:

.....as .....ge .....e .....i .....ajn ..... ojn
.....as .....ge .....i .....ajn ..... ojn
.....i .....ajn .....ojn oni .....as .....re .....e

Kiel oni entajpas la lecionojn?

Oni entajpas la lecionojn per plej diversaj redaktiloj. Mi uzas *Professional Editor,* kiu estas unu el la pli malmultekostaj.

Pri la formo de la demandaro:

Demando povas havi ĝis 10 liniojn de 80 karaktroj, sen kalkuli la kontrolsignojn. La unua karaktro de la unua linio devas esti blanka; la aliaj linioj devas komenci per la speciala signo ∝.

Kelkaj ekzemploj:

Aperas sur la ekrano: ..... *estas la ĉefurbo de Francio.*

La entajpita teksto: *{Parizo} estas la ĉefurbo de Francio.*
La atendita respondo: *parizo* aŭ *Parizo.*
Rimarko: la minuskloj estas aŭtomate ŝanĝitaj en majuskloj.

Aperas sur la ekrano: ..... *estas la ĉefurbo de Francio.*
La entajpita teksto: *{Par|izo} estas la ĉefurbo de Francio.*
La atendita respondo: *par* aŭ *Par.*
Rimarko: la tuta vorto estas kaŝita, sed 3 literoj sufiĉas.

Aperas sur la ekrano: *Parizo estas la ĉef..... de Francio.*
La entajpita teksto: *Parizo estas la ĉef{urbo∅} de Francio.*
La atendita respondo: *urboCR.*
Rimarko: CR estas ĉaretreveniga signo — speciala klavo kiu ĉi tie signifas ke la o estas la lasta litero. Kiam la lernanto tajpis *urbo,* la maŝino atendas, kvazaŭ la lernanto estus forgesinta ion. La kutima reago estas aldoni *n* por skribi *urbon.* Tio estas kompreneble erara. Tiu signo ∅ donas ja plian eblecon erarigi la lernanton. Uzu ĝin do ŝpareme.

Aperas sur la ekrano: ..... *estas la ĉefurbo de Francio.*
La entajpita teksto: *{Parizo} estas la ĉefurbo de Francio.* — ∝ {| *Tie troviĝas la fama Ejfelturo.*}.
La atendita respondo: *parizo* aŭ *Parizo.*
Rimarko: la frazo "Tie troviĝas la Ejfelturo" aperos poste, se la respondo estas bona aŭ malbona. Ĝi ne aperas sur la ekrano antaŭ ol la lernanto respondas. Aldonaj klarigoj pri la demando kutime aperas inter {|.....}.

Aliajn detalojn mi klarigos en la provdisketo.

Kiun komputilan lingvon oni povas uzi?

La programo estas skribita en la ĝis nun plej populara komputlingvo BASIC. Ekzistas diversaj BASIC, sed la transskribo de unu en la alian ne donas nesolveblajn problemojn. Kompreneble, oni povas ankaŭ traduki en aliajn lingvojn, kiel C-lingvon, PASCAL kaj tiel plu. — La tekston mem de la lecionoj oni ne bezonos ŝanĝi.

Kiel utiligi la diversajn modelojn de ekrano?
Ekzistas 2 specoj de ekrano: tiuj kiuj permesas konstrui la bildon mem, punkton post punkto, kaj tiuj kiuj permesas montri 256 jam antaŭdesegnitajn karaktrojn. La duaj kostas malpli ol la unuaj. Krome, la plej multekostaj ekranoj (kutime) kapablas skribi ankaŭ kolore.

La programo kapablas utiligi tiujn kolorojn, sed ne uzas la eblecon desegni objektojn. Mi celas la malpli multekostajn aparatojn.

Ĉu diferencaj klavaroj povas esti uzataj?
Tio ne vere estas problemo de la programo. Tiu problemo estas solvita antaŭ la ekfunkciado de la programo. Tamen ĝi povas krei malfacilaĵojn por la uzanto, kiu ankoraŭ ne konas sian propran komputilon. Mi klarigos kion fari aliloke.

Kiel solvi la lingvo-problemon?
Ĉiu direktivo donita de la programo povas esti tradukita. La traduko estas metita en la "menuo" aŭ en leciono. La programo mem ne ŝanĝiĝas.

Ĉu oni povas skribi Esperantajn literojn?
Malmultekostaj ekranoj ne havigas tiun eblecon. Mi uzas la sistemon *ch, gh, hh, jh, sh, ù,* kiu miaopinie estas la plej taŭga. Nun la teksto de la lecionoj enhavas *cˆ, gˆ, hˆ, jˆ, sˆ, uˇ,* sed tion ne vidas la lernanto. Tio permesas al mi rekoni la Esperantajn literojn kaj, kiam la ekranoj pliboniĝos, mi facile povos aperigi la ĝustan simbolon. Se la interna teksto enhavus *ch, gh, sh ...* ktp, mi ne kapablus rekoni Esperanton dis de alia lingvo.

Kie oni povas mendi la disketon? Kiom ĝi kostas?
La kurso ankoraŭ ne estas aĉetebla en la merkato. Kunlaborantoj

aktuale pagas nur la prezon de la disketo kaj sendokostojn. Tio egalas proksimume al 150 belgaj frankoj. Ili rajtas uzi la programon, sed ne kopii ĝin. Komence de 1987, oni povos akiri la programon ĉe: Esperanto-Domo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (Belgio).

Kiam la programo estos preta?
La programo estas jam nun uzebla. La antaŭviditaj plibonigoj nur malmulte ŝanĝos kion mi diris ĝis nun. Temas ĉefe pri la prezentado — nesubtaksenda tasko.

Aldone al tio, estas multaj detaloj kiujn oni tuj komprenas kiam oni uzas la programon.

Kiam la Franca-Esperanta kurso estos finpreta?
Neniam. Ĉiam aldoniĝos novaj lecionoj kaj la malnovaj estos plibonigataj. Komence de 1987 la unuaj dek lecionoj estos verkitaj. La postaj lecionoj estos tute en Esperanto.

Ĉu oni povas antaŭvidi tradukon de la Esperanta kurso en aliajn lingvojn?
Traduko en la nederlandan verŝajne estos preta unue. Poste tio dependos de la sukceso de tiu ĉi unua metodo. Se alia pli bona kaj pli malmultekosta aperos, kompreneble ni traduku tiun unue.

Kiu estas la plej malfacila tasko, kiam oni verkas porkomputilan kurson?
Plej malfacila afero estas ne timigi la lernanton. Infano devas esti kapabla fari tion kvazaŭ kiel ludo. Daŭrigado de la lernado ankaŭ starigas problemon, sed la plej grava estas ke oni neniam povos esti certa ĉu la lernanto efektive legis ĉiujn prezentitajn informojn, eĉ kiam li respondis ĝuste.

Ĉu oni povas apliki tiun ĉi programon en lernejoj?
Mankas por tio ankoraŭ kelkaj funkcioj. Mi volonte aldonos ilin poste, se montriĝos bezono.

Eblas registri ĉion kion tajpas la lernanto, literon post litero, kaj kiam. Poste mi povos skribi programon kiu analizos la lernadon mem. Tiam mi povos respondi ankaŭ al demandoj kiaj: Kiom da tempo la lernanto bezonis por finlerni? Kiujn demandojn li malfacile memoris? Kiom da tempo li bezonis por respondo, kaj kiom da fojoj li eraris? Se la lernanto eraris, ĉu li eraris sur la unua, la dua aŭ la tria litero?

Por registri tiajn statistikojn, necesas reverki parton de la programo en maŝina lingvo: BASIC estas por tio tro malrapida.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Konsiloj al tradukontoj
Via traduko devas esti pli bona ol la originalo! Vi rajtas eĉ ŝanĝi la Esperantajn frazojn. Atentu pri la celo de la leciono. Vi rimarkos ke la franca teksto plej ofte estas pli longa ol la Esperanta. Tion mi faris intence. En viaj ekzemploj, provu ankaŭ montri la logikecon kaj simplecon de nia lingvo internacia.

Espereble vi komprenis, ke plej temporaba tasko estas la skribado kaj elprovado de la lecionoj. Kompare al tio, la skribado de la programo mem estas sensignifa. Mi pretigis kelkajn lecionojn por demonstrado, kaj daŭrigos la laboron ĝis la komenco de 1987. Sed poste, mi lasos la respondecon pri la kurso al profesiaj instruistoj, kaj programos ion alian kion ni urĝe bezonas: aŭtomatan korektadon de Esperantaj tekstoj.

Mi dankas ĉiujn kiuj jam helpis en tiu ĉi projekto, ne sciante ĉu ĝi sukcesos aŭ ne.

Mi ankaŭ deziras, ke ĉiuj kiuj laboras je simila projekto havu la kuraĝon daŭrigi, kaj iom da tempo por priparoli ĝin.

Instrumetodoj

CSEH-METODO

Kelkaj konsiloj al instruantoj*

(kun aldonitaj aktualigoj laŭ metodika vidpunkto)

1. La kursejo estu kiel eble plej komforta kaj agrabla, kun oportunaj sidlokoj, bonaj lumo kaj hejto, por ke malkomfortaĵoj ne ĝenu la atenton, tiome necesan dum la lecionoj. Tre grava estas la granda kaj bona nigra tabulo, ĉar lernolibroj ne estas uzataj kaj la sola fonto de tekstoj estas la tabulo. La sidlokoj estu oportunaj por skribado.

   Andreo Cseh konsilas uzi 'nigran' tabulon. Nun plej ofte ĝi estas 'verda' tabulo; krom ĝi estas konsilinde uzi t.n. 'flanelan' tabulon kaj fikseblajn surĝi diversspecajn bildojn, kiuj prezentas lernotajn objektojn, kiel ekzemple ŝipon, aviadilon k.s. aŭ situaciojn kiel trinki, veturi. La resto de la konsilo daŭre aktualas.

2. La nombro de la kursanoj estu inter 20 kaj 40. Pli aŭ malpli alta nombro ne estas utila.

   Laŭ la lastaj esploroj montriĝis ke la optimala nombro da kursanoj estu inter 8 kaj 15, por ricevi la plej bonajn rezultojn, kvankam laŭ ĉi-tiu metodo eblas gvidi grupojn eĉ pli grandnombrajn, ekz. 40 ĝis 100. Sed tiam la instruanto devas speciale adaptiĝi al tiaspeca amas-instruado.

3. La kursmaterialo sufiĉas por 20-25 duhoraj lecionoj. Ĝi ne estas dividita en lecionojn, sed nur en punktojn. La instruisto povas interrompi la instruadon ĉie ajn, sed estas konsilinde rondigi la materialon por unu leciono.

   La divido de kurs-teksto en punktojn anstataŭ en lecionojn estas tre moderna konsilo, kiu ebligas al lerta instruanto adapti la instrumaterialon al la nivelo de lia grupo aŭ al la cirkonstancoj. La plej taŭga tempodaŭro por ĉiu kurs-'horo' estas 90 minutoj. En tia periodo estu instruataj de 10 ĝis maksimume 20 punktoj.

4. *Ne imitu sklave, sed ŝanĝu, transformu la materialon laŭ la bezonoj,* precipe laŭ la personeco, temperamento de la instruisto kaj laŭ la klereco kaj interesoj de la lernantoj, kaj laŭ la lokaj cirkonstancoj. *La skribita kursoteksto ne estu kateno por la instruisto, sed nur modelo kaj konsilo.* Havu inventemon por ŝanĝi laŭ momentaj bezonoj.

   Tiu-ĉi konsilo signifas, ke la vortprovizo ne estas strikte fiksita, sed ke la instruanto devas adaptiĝi al la aktualaj kondiĉoj, ekzemple en Eŭropo enkondukante la vorto "besto" li povas montri hundon, sed en Afriko en tia situacio elefanton. Ankaŭ la de A. Cseh uzatajn datojn oni ĉiam nepre aktualigu. La instruantoj, kiuj ne kuraĝas aŭ ne kapablas memstare uzi kaj adapti la metodon kaj materialon, neniam fariĝos bonaj Cseh-instruistoj. Kiu volas instrui spontanean uzadon de Esperanto devas mem kapabli spontanee adapti ĝin al aktualaj cirkonstancoj. Tiu adapto validas ankaŭ por klarigado de novaj vortoj. Kursgvidanto, kiu konas pli bonan manieron, ne timu uzi ĝin, kondiĉe ke ĝi efektive estas pli bona kaj ke la lernantoj pli rapide komprenas.

5. Farante ŝanĝojn tamen atentu, ke la necesa ordo ne renversiĝu. La nuna ordo estas rezulto de longa spertado. Facilanima ŝanĝado en la ordo de gramatikaĵoj kaj vortoj povas sin venĝi, kaŭzante malfacilaĵojn poste.

   Oni rajtas ŝanĝi la vortprovizon, adapti ĝin al aktuala situacio, sed oni ne ŝanĝu la sinsekvon de gramatikaĵoj. Tiu kiu ne atentas la internan dependecon de la gramatikaj formoj (en la kursteksto) kondukas siajn lernantojn al marĉo el kiu ili jam ne plu povos savi sin; tion konfirmas la praktiko.

6. La enkadrigitaj tekstoj estas skribotaj sur la tabulon, same kiel la substrekitaj vortoj. Sur la tabulon oni skribu elegante kaj klare, tre klare, ĉar la lernantoj ja ne havas librojn.

   Por plifaciligi la laboron por la instruanto, ni metis la nove enkondukotajn gramatikaĵojn marĝene, escepte la kadrojn, kiujn uzis Cseh mem. Estas bone prepari sur apartaj folioj la novajn (do substrekitajn en la kurs-teksto) aŭ enkondukotajn vortojn (ekster la teksto); ilia enkonduko nepre estu ligita kun bildo, gesto, priskribo pere de jam konataj vortoj. Tiucele oni povas uzi kiel ekzemplon la "Konversacian Vortareton", kiu troviĝas en la help-materialo. Oni listigu la novajn vortojn kaj havu la liston antaŭ si, por ne instrui tro da vortoj en unu fojo. Se la situacio dum la leciono postulas de vi uzadon (enkondukon) de aliaj vortoj, oni faru tion forlasante la preparitajn, por eviti

   enuon. La instruado okazu ĉiam en plej naturaj kondiĉoj; instruanto do ĉiam estu adapt(iĝ)ema.

7. Koloran kreton uzu por atentigi pri novaj gramatikaĵoj (akuzativo, verbotempoj, sufiksoj).

   Estas bone de komenco uzi konsekvence la samajn kolorojn por la sama celo, ekzemple por substantiva finaĵo *-o* ĉiam flavan, por akuzativa finaĵo *-n* ĉiam ruĝan. Oni instigu ankaŭ lernantojn uzi kolorajn skribilojn.

8. En la kurso la plej grava afero estas la personeco de la instruisto. *Li povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la plej bonan.* Tial klopodu regi vin mem kaj vian taskon kaj fariĝu majstro en via fako.

   La kursgvidanto estas la sola lingvo-aŭtoritato, kiun povas konsulti la kursanoj. Tial necesas ke la kursgvidanto mem kompetentu en la lingvo, parolu ĝin klare kaj internacie kaj bone komprenu ĝian strukturon. Por sukcese apliki la metodon oni krome devas funde kompreni ĝiajn bazajn principojn kaj fidi je ilia efiko.

9. Ne rapidu en la instruado! Tio tute ne helpas. Se ne restas sufiĉe da tempo, prefere forlasu partojn, precipe el la lastaj partoj de la kursteksto. Aŭ forlasu negravajn rakontaĵojn. Forlasado, mallongigado estas farebla en la jenaj partoj: punktoj 39-42 kaj 44-45 (mallongigu, se la nacia lingvo de la lernantoj jam posedas la akuzativon), 139, 156, 159, 170-177, 180-185, 197, 208, 227-229, 254, 255.

   Ne rapidi en la instruado estas tre grava konsilo, kiun tro ofte neglektas la kursgvidantoj. Oni sekvu ĉiam la proverbon "Ripetado estas la patrino de lernado". Tamen tiu ripetado estu varia por eviti enuon; oni devas konscie ripetadi. Oni ja "ne skribu sur akvon, sed ĉizu en ŝtonon" (paroloj de Cseh). La kursgvidanto stampu en la cerbon de siaj lernantoj *Esperanto*-strukturojn, por malhelpi ke ili pensu laŭ nacilingvaj strukturoj. Ili de komenco devas lerni pensadi Esperante, sen traduki el nacia lingvo. Tio estu unu el inter la ĉefaj celoj de kursgvidanto.

10. Mia laboraĵo tute ne estas perfekta. Tial mi petas la ŝatatajn gekolegojn, ke ili bonvolu kritiki kaj plibonigi kaj pri tio min sciigi. Kun dankemo mi akceptos iliajn proponojn kaj konsilojn.

Kunlabora grupo ĉe I.E.I. volonte akceptos viajn rimarkojn, informojn, spertojn, speciale kiam ili temas pri de kursgvidanto uzataj aliaj helpiloj. Eventuale I.E.I. aldonos ilin al la kursmaterialo aŭ al la listo de helpiloj.

11. En la lecionoj klarigu ĉion bone kaj plene laŭ la bezonoj. Ne kontentiĝu per la respondo de la lernantoj "Ni komprenas". Lerta instruanto rimarkas se tiu respondo ne estas sincera.

Necesas ne nur klare prezenti kaj komprenigi la instruataĵojn, sed ankaŭ praktikigi ilin. Oni ne kontentiĝu per la respondo "Mi komprenas", sed postulu ekzemplon, por konstati ĉu vere la prezentita ero estas komprenita.

12. Informiĝu pri la gramatikaj reguloj kaj karakterizaĵoj de la nacia lingvo de via kursanaro, por ke vi povu trovi la plej facilan kaj taŭgan manieron de la klarigado.

Havante internacian grupon de lernantoj, ekzemple dum kongreso aŭ Esperanto-ferio, oni klopodu komprenigi la novajn nociojn per simpla, klara maniero, surbaze de la ecoj de Esperanto, sen konsidero pri naciaj lingvoj.

13. Ĉiam petu poste konsilojn de spertaj samideanoj, ĉeestantaj viajn lecionojn.

Se "spertaj samideanoj" ĉeestas la lecionon, la kursgvidanto ne permesu al ili interveni dum la leciono; ĉiuj rimarkigaj diskutoj okazu poste, *sen* ĉeesto de lernantoj.

14. *Preparu vin bone al ĉiu leciono, por ke vi estru la materialon kaj la lernantaron.*

Ne-uzado de nacia lingvo devigos instruanton al plej detala sinpreparo por la leciono; oni devas atente konatiĝi kun la instruotaj temoj por la lecionoj. Elekti konforman vortprovizon, bezonotajn objektojn kaj teknikon de prezentado. La prezentado de novaj vortoj aŭ gramatikaĵoj devas esti tiel bone pripensita kaj pretigita, ke ĝi kreu ĝustajn (ne erarigajn) asociaĵojn kaj gvidu al ĝusta kompreno. Oni devas memori ke en tiu ĉi metodo la lernanto mem induktas la regulojn de la lingva sistemo kaj malkovras la sencon de la prezentataj lingvaĵoj.
Estas konsilinde pristudi la bezonatajn gestojn kaj pantomimojn kaj praktiki ilin, ekzemple antaŭ spegulo, uzante ĉiun instru-helpilon uzotan dum la leciono, al imaga kursanaro. Nur dum aktiva praktikado oni konstatas eventualajn malfacilaĵojn. Sekve oni devas memori pri jenaj bazaj instru-paŝoj "de konataĵo al nekonataĵo", t.e. uzi nur konatajn vortojn por enkonduki

novajn gramatikajn elementojn — vidu la Konversacian Vortareton — aŭ uzi konatajn gramatikajn elementojn por enkonduko de novaj vortoj, do sekvi la duan instru-paŝon: "de pi facila al pli malfacila".

15. Ne donu tro grandan materialon en unu leciono, ĉar la cerbo bezonas tempon por digesti, same kiel la stomako.

Apliku tiun ĉi konsilon ĉiam! Estus ankaŭ bone memori la saĝan konsilon de Zamenhof: "ne tro multe, ne tro krude per unu fojo".

16. Dum la lecionoj parolu malrapide kaj tre klare. Haltu inter la frazpartoj, por ke la vortoj ne kunfluu. En la parolo oni ne povas vidi la distancojn inter la vortoj, kiel en la skribo. Per lerta kaj agrabla, *sed ne tro aktoreca modulado de la voĉo* pentru la enhavon de viaj diraĵoj.

Memoru ke oni instruas ne nur parol-kapablon, sed ankaŭ aŭd-komprenkapablon.

17. Faru nur tiajn demandojn, je kiuj oni povas doni certan respondon. Postulu ĉiam kompletan respondon; ne akceptu nur "jes" kaj "ne". *La celo de la metodo estas ĝuste la paroligo de la lernantoj.* En la komenco de la kurstekstoj staras la plenaj respondoj, sed por ŝpari spacon, poste ili estas mallongigitaj. Sed en la kurso la lernantoj devas respondi ĉiam per kompleta frazo, ĝis la kursfino.

Dum plifirmigaj ekzercoj oni postulu kompletajn respondojn uzante "KI-demandojn" aŭ kompletajn negativajn respondojn al "ĈU-demandoj" — vidu "Informoj pri la kurso", punkton 3 — "KI-demandoj" pli bone enigas la kursanon en la sistemon de la lingvo Esperanto. Oni postulu ke la lernanto mem starigu la demandojn (kompreneble helpe de la instruanto). Kapablo starigi demandojn gravas por ĉiutagaj dialogoj. Estas pli facile respondi demandon ol krei ĝin.

18. En la kursteksto la korektado sur la tabulo estas notita per trastreko. Sed dum la lecionoj oni faru ĝin simple per viŝilo kaj enskribu la novan tekston en la lokon de la forviŝita.

19. Por dumleciona uzado estas konsilinde fari mallongigitan ekstrakton el tiu ĉi kursteksto, por kontroli la sinsekvon de la partoj kaj malebligi forgesadon pri gravaĵoj.

Vidu la libron "Metodiko en la Praktiko" (paĝojn 55 kaj 79) apartenantan al la deviga literaturo por Cseh-instruantoj.

20. La aldonitaj koloraj folioj *servu kiel modeloj* por la disdonotaj paperoj. *Demandarojn oni povas disdoni pli ofte, kun laŭplaĉaj demandoj.* Belajn kalendaretojn presigis la Internacia Esperanto-Instituto, kiu volonte sendas al la kursgvidantoj laŭbezonan kvanton je simpla peto per poŝtkarto. Estas utile disdoni al la lernantoj aliajn presaĵojn, ekz. turismajn prospektojn kaj ekzemplerojn de gazetoj, kiujn la kursgvidantoj povas facile akiri senpage. Tiaj donacetoj estas agrablaj por la lernantaro.

21. Komencu ĉiun lecionon per kelkaj demandoj, kiuj ripetas la materialon de la lasta leciono.

La unuajn 5-10 minutojn oni dediĉu al ripetado de la lasta leciono. Tiu ekzerco ne nur helpos al la kursgvidanto orientiĝi ĉu la instruita materialo estas 'digestita' de la lernantoj, sed samtempe oni 'varmigas' la parolorganojn kaj pretigas sin al la Esperanto-parolado.

22. Decan bonhumoron, ŝercojn apliku inter pripensitaj limoj. Nobla gajeco origu vian laboron. Zorge evitu demandojn aŭ aludojn, kiuj povus ofendi aŭ ĝeni iun. Faru vian laboron elegante por imponi.

Oni zorgu ne tuŝi religiajn aŭ politikajn 'tabuojn'. Oni estu ankaŭ sentema al fremdaj kultur-kutimoj. Cseh-instruisto, kiu ofte laboras en fremdaj landoj, devas esti speciale atentema ĉi-rilate.

23. Vivigu vian tutan laboron amo al Esperanto kaj amo al viaj lernantoj. Tiam vi brile sukcesos kaj miaj konsiloj estos superfluaj.

Tie ĉi "amo" inkludas respekton, kiun oni havu kaj montru al ĉiu homo.

Se *la teoria ĝermo* de la "apriorismo" estas la filozofia lingvo-kritiko (kp. § 1.3), tiu de la "aposteriora" koncepto havas siajn radikojn en la "analogia-anomalia diskuto" de Stoikistoj, pluevoluigita far VARONO.

Al la rilato inter la Helena diskuto kaj la modernaj "aposterioraj" sistemoj aludis la unuan fojon FRITZ MAUTHNER: "Se la analogistoj estus venkintaj, tial nun ekzistus [en la Latina Sz. I.] nur unusola, senescepta deklinacio, same unusola, senescepta konjugacio, kies normojn oni estus deduktintaj el la multtipaj deklinacioj kaj konjugacioj, fiksinte striktajn uzregulojn kaj strikte obeante ilin – kaj hodiaŭ ni povus uzi komfortan Latin-Volapukon". La "analogistoj" serĉis formalajn regulojn inter la sam-statusaj gramatikaj kategorioj kaj la ilin reprezentantaj lingvaj signoj. La principa diferenco inter la du kontraŭaj partioj estis la jena: la *"anomalistoj"* postulis la lingvo-priskribon surbaze de ĝia uzado, t.e. dedukti la sistemon el la funkciado; la *"analogistoj"* volis preskribi la normojn antaŭ la uzado kaj postuli ilian striktan obeadon. Per tio la "analogistoj" estas konsidereblaj la antaŭuloj de la modernaj lingvoplanistoj kaj samtempe ankaŭ de la modernaj "aposterioristoj".

4.2. Inter **lingvoplanado kaj interlingvistiko** estas multaj similaĵoj: la lingvo-idealo de ambaŭ estas tre proksimaj unu al la alia.

La lingvo-idealon de lingvoplanado formulis VALTER TAULI: "Tiu estas la ideala lingvo, kiu per minimumaj rimedoj realigas maksimuman rezulton."

La lingvoplanado okupiĝas pri unusola etna lingvo, temas pri reguligo kaj normigo kaj ne pri kreado de nova lingvo. Tamen ĝiaj modeligaj principoj estas tre proksimaj al la interlingvistikaj. Laŭ TAULI la kriterioj de la ideala lingvo estas:

a. ĝi povu komuniki ĉiujn bezonatajn informaĵojn, ĝis la plej subtilaj nuancoj;

b. ĝi estu maksimume ekonomia, t.e. kiel eble plej facila kaj por la parolanto kaj por la aŭskultanto;
c. ĝi estu maksimume estetika;
ĉ. ĝi estu kiel eble plej elasta, por ke ĝi povu ĉiam akomodiĝi al la cirkonstancoj.

La kriterioj de *"aposteriorisma" lingva idealo*, formulitaj de EDWARD SAPIR estas tre proksimaj al tiuj de TAULI: la internacia helplingvo estu simpla, regula, logika, racia, riĉa, elasta; samtempe: plej facile lernebla kaj plej multflanke uzebla. Krome: ĝi povu esprimi ĉiujn nuancojn kaj estu malfermita t.e. evolukapabla. Estas evidente, ke tiu idealo estas nerealigebla, des pli, ĉar inter la kriterioj troviĝas kelkaj, kiuj sin ekskludas, ekz. facileco kaj riĉeco je nuancoj k.s. Cetere tion rimarkas mem SAPIR: "La idealoj ekzistas ne por ilin efektivigi. Multe pli ili ekzistas por montri la evolu-direkton."

OTTO JESPERSEN iras unu paŝon plu: li kategorie deklaras, ke neniu elemento de la internacia helplingvo estu elpensaĵo de la aŭtoro, sed – laŭeble – ĉiuj ĝiaj elementoj estu internacie konataj. Se tiu principo en certa okazo ne estas realigebla, tiam oni elektu elementon, kiu estas plej proksima al la fundamenta idealo, t.e. la maksimuma kompreneblo per maksimuma facileco por la plej granda nombro da homoj. La lingva idealo de JESPERSEN jam montras la direkton al la t.n. *"naturalismo"* (al tiu temo ni revenos pliposte). La t.n. "naturalismaj" projektoj estas simplaj simulaĵoj de la "naturaj" lingvoj, la "naturalistoj" fabrikas kaj ne kreas, imitas kaj ne inventas.

Resume:

La "aprioraj" modeloj estas **centripetaj**: direktiĝas el la eksterlingva realaĵo al la lingva medio. Ilia esenco estas la analizado de la konceptaj kategorioj, kiuj transformas certan segmenton de la eksterlingva objektiva mondo je lingva substanco. Oni supozas, ke oni jam scias ĉion pri la eksterlingva mondo kaj ke oni kapablas ĉion "lingvigi". Ĉiujn eblajn situaciojn de la fenomenoj kaj eventoj la aprioristo analizas logike, organizas ilin hierarkie kaj poste la tiel fiksitan sistemon transmetas en la retaron de lingvaj signoj. La "aprioristo" ne konsideras la fakton, ke la priskribo de la eksterlingva realaĵo estas ĉiam relativa kaj neniam povas esti plena/tuta/perfekta. Oni ne konsideras la rolon de la lingvo en la pensado kaj konceptado de la eksterlingvaj faktoj kaj oni erare pensas, ke tiuj faktoj estas rekte kaj senpere transformeblaj je lingvaj signoj. Tiu transformado (aŭ kiel ni antaŭe nomis ĝin: tradukado) okazas ne per lingvistikaj rimedoj kaj tial ili estas ĉiam arbitraj.

La "aposterioraj" modeloj estas **centrifugaj**: ili deiras de la lingvo, restas ĉiam interne de la lingvo, operacias per lingvistikaj rimedoj kaj pere de ilia semantiko interrilatiĝas kun la eksterlingva mondo. (Pri ili pli detale ni parolos pliposte.)

Fine: restis respondenda ankoraŭ la demando: kia estas *la rilato inter la du sistemoj*? Ekzistas du ekstremaj opinioj. Laŭ la unua – inter ili estas nenia rilato, estas du, tute diversaj problemaroj (MAX MÜLLER). Laŭ la alia: la "aposterioraj" modeloj estas organikaj daŭrigoj de la "aprioraj" (A.G. VOLKOV). Niaopinie: la du modeltipoj estas du polusoj de la sama kontinuo kaj inter tiuj du polusoj ekzistas multaj tre diversaj, miksaj kaj transiraj variantoj.

5. Estas ofte problemo: kiel nomi per komuna termino la "apriorajn" kaj "aposteriorajn" projektojn? En lingvoscienco ĝenerale oni nomas tiujn sistemojn **"artefaritaj/artaj lingvoj"**, por ilin distingi de la t.n. **"naturaj lingvoj"** — t.e. de historie evoluintaj, etnaj/ naciaj lingvoj. En la lingvistika literaturo la plej ofte rolanta nomo estas "artefarita help-lingvo", "internacia arta lingvo" k.s.

5.1. La opozicio **natura-arta** nur laŭnome aludas al la pra-Helena Kratilismo, al la *physeu-thesei*-diskuto. Apenaŭ troviĝas hodiaŭ serioza lingvisto, kiu asertus, ke la homa lingvo estas produkto de la

naturo kaj ne socia produktaĵo. Tiu-koncepte la epiteto "natura" antaŭ la substantivo "lingvo" ŝajnas esti absurda — ja ĉio, kion kreis la homo, estas "arta".

5.2. Jam ekde la plej fruaj tempoj, sed precipe en la 14a–15a jarcentoj la termino **"natura lingvo"** estis kvazaŭ sinonimo de la supozata **pralingvo de la homaro**, konsiderata perfekta kaj identigata kun la **lingvo de Adamo**. La monogenezo de lingvoj, la unusola *primiloquium* estis ĝenerale akceptata teorio pri la origino de la homa lingvo, surbaze de la Biblia teorio: *"Komence estis unu lingvo kaj unu parolmaniero/ lingvaĵo..."*.Laŭ la Biblio ne Dio, sed la homo (= Adamo) kreis la lingvon: Dio kondukis Adamon al la kreitaĵoj, montris ilin, kaj Adamo donis al ili nomojn. La unua lingvo-kreinto (*onomatheta*) estis do ne Dio, sed la homo. Sed jam DANTE starigas la demandon: en kiu lingvo nomis Adamo la kreitaĵojn? (*"Quid autem prius vox primi loquentis sonaverit?"*). Kaj la plej ĝenerala respondo estas: tiu lingvo — kiu ajn ĝi estu — tutcerte estis perfekta, ĉar estis la lingvo de la naturo, lingvo, kiun ĉiu homo povus paroli kaj kompreni sen aparta lernado, do: **la natura lingvo**. Tiu natura lingvo estis poste disipita dum la Babela puno, ĝiaj elementoj troviĝas disipite en la "partikularaj" lingvoj. Sekve: tiu, kiu volas konstrui la perfektan, naturan lingvon, devas kolekti tiujn praelementojn kaj kunmeti ilin: *"Skittius dixit: ex omnibus linguis fieri per abstractionem posse linguam universalem matricem radicalem, quam nemo loquatur, sed quæ sit omnium radix"*. [Citita ofte ĉe pluraj aŭtoroj, inter ili ankaŭ LEIBNIZ!].

(Daŭrigota)

Gvidlibro por instruantoj:

Cseh-Kurso. Gvidilo por instruantoj, sesa eldono, parte reviziita. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Den Haag, 1986. 147 paĝoj. Mendebla ĉe I.E.I.

Instrumetodaj gvidlibroj:

Zagreba metodo – Skizaj instrukcioj por kursgvidantoj. Eld. Internacia Kultura Servo. Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb, 1985. 8 paĝoj. Mendebla ĉe la eldonejo.

En novan mondo – Eichholz, Vilma Sindona – Rektmetoda kurso por geknaboj. Gvidlibro. Eld. Esperanto Press, Bailieboro, Ontario K0L 1B0, Kanado, 1986. 150 paĝoj. Mendebla ĉe la eldonejo.

Esperanto-Ludado-Metodo – Nova spontanea maniero lerni la Internacian Lingvon. Informoj ĉe: Ceará Esperanto-Asocio, Gilberto Martins Borges Filho, Rua José Marrocos 415, CEP: 60.325 Fortaleza-Ceará, Brazilo.

Esplor-Kreiva Vojo al efektiva regado de fremdaj lingvoj. D-ro W. Knibbeler (Universitato de Nijmegen, Erasmusplein 1). Esperanta adapto de Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, 1986. 21 paĝoj. Mendebla ĉe O. Hoekstra.

Lingvistiko

LA NORVEGA LINGVO

Odd TANGERUD

Evoluo kaj nuna stato. — Klarigo pri la fakto, ke ni havas du oficialajn lingvojn: unu bazitan sur la indiĝenaj dialektoj, nomitan *Nynorsk* (Novnorvega), kaj alian nomitan *Bokmål* (Librolingvo), kiu norvegiĝis el la dana. Ambaŭ estas vigle vivaj kaj havas riĉan literaturon.

La **ĝermanaj lingvoj** formas tri ĉefajn branĉojn: la gotan, la okcidentĝermanan kaj la nordajn lingvojn. La gotaj lingvoj estas mortaj. Okcidentĝermanaj lingvoj estas inter aliaj la germana, la flandra kaj la angla. La nordaj lingvoj estas la dana, la sveda, la norvega, la feroa (*færeya*) kaj la islanda. El tiuj la islanda konservis plej fidele la strukturon de la mezepoko, kaj grandparte faris tion ankaŭ la feroa. La aliaj nordaj lingvoj tiriĝis grade en la internacian lingvan 'kirlilon'. La distingo inter la tiel nomataj fortaj kaj malfortaj verboj — ofte nomataj neregulaj kaj regulaj — iom malaperas. La ŝanĝo de vokaloj en la konjugacioj ofte malaperas; la kazoj malaperas kaj estas anstataŭigataj per pli fiksa vortordo en la frazoj; la vokala riĉeco en la pluralo de substantivoj malaperas. Alie dirite, unuformiĝo pli kaj pli karakterizas la lingvan evoluon.

En 1380 Norvegio kaj Danlando pro heredo unuiĝis sub la dekjara reĝo Olav Håkonsson. Tiu unuiĝo daŭris ĝis 1814. Dum tiu tre longa periodo la reĝoj loĝis en Kopenhago. Sekve nia lando estis administrata de tie, kaj la ŝtataj aŭ publikaj oficistoj ĉefe elektiĝis inter danoj. En la jaro 1604 la norvegaj leĝoj estis tradukataj el la mezepoka norvega lingvo en la danan, kaj en 1687 oni ellaboris tute novan leĝaron en la dana lingvo.

La sola universitato situis en Kopenhago, kaj en 1629 la registaro postulis, ke pastroj havu universitatan ekzamenon por ekhavi postenojn. La instruon oni faris en la dana lingvo. En la jaro 1537 la lutera religio estis enkondukata en Norvegio. Tio necesigis novan instruon, novajn presitajn tekstojn kaj novajn librojn. Tekstoj kaj libroj presiĝis en Danlando, kiu sola havis presejojn. La unua tie stariĝis en 1480. La unua presejo en Norvegio komencis presadon en malgranda skalo en 1643, kaj ĝi presis nur danlingve. La "Nova Testamento" de la Biblio tradukiĝis en la islandan lingvon (mezepokan norvegan) en 1539, unu el la motivoj kial la islanda lingvo restis tiom pura. La danoj ricevis sian bibliotradukon en 1529. Tiu traduko estis ankaŭ la sola por Norvegio, kaj la religia lingvo estas tre influita de tiu dana traduko. Dio ja ne parolis la norvegan lingvon, kaj precipe ne dialektinfluitan lingvaĵon. Nia unua bibliotraduko aperis nur en 1873 en la lingvo, kiu poste nomiĝis *Bokmål*. En la lingvon *Nynorsk* tradukiĝis la "Nova Testamento" en 1889, kaj la tuta Biblio en 1938.

En 1811 la absoluta monarko, post jaroj de postuloj de norvegoj, fondis la norvegan universitaton en Oslo — kiu tiam nomiĝis Christiania (ekzemplo pri danigo de mezepokaj norvegaj nomoj).

Post la Reformacio en 1537 (en Danlando 1536) la sola skriba lingvo estis la dana. Religia konfirmacio fariĝis leĝe deviga en 1736, kaj sekvis ĝin iom pli sistema instruado en legado. Longajn religiajn tekstojn oni devis lerni parkere. La lingvaĵo en tiuj tekstoj estis tiel fremda al la ĉiutaga parolmaniero de la kamparanoj en niaj valoj, kiuj faris la lukton por vivteni sin sur deklivaj kampoj, en arbaroj kaj en la montaro, ke ĝi evoluis laŭ propraj internaj leĝoj. Tamen, kiam norvegoj, kiuj ne studis en Kopenhago, legis danajn tekstojn, ili legis ilin kun norvega prononco, ĉar la du lingvoj tiom similas, ke tio bone eblas. La vortprovizo estas grandparte la sama. Norvegio estis kampara lando, kaj la urboj estis etaj. La urbanoj estis forte ligitaj al la kampara vivo, kaj ĉiuj parolis sian lokan dialekton. Tial la parolata lingvo restis sen tro forta eksterlanda influo, sed super ĝi kuŝis ia tavolo de altsocia parolmaniero bazita sur skriba dana lingvo. Tio estas la origino de kelkaj sociolektoj en Norvegio.

La dua urbo laŭ grandeco estas Bergen, sur la okcidenta marbordo. Tiu urbo estis grava komerca centro por la Hanso-organizo en la nordgermanaj urboj. La renkontiĝo de du malsamaj lingvoj kiel la norvega kaj la germana kaŭzis, ke en tiu urbo tute malaperis el la lingvo la ina gramatika genro, kaj la opozicio kontraŭ *Nynorsk* estas forta.

En 1814 Norvegio kaj Svedio unuiĝis post la devigita konsento de la dana absoluta monarko. Reprezentantoj de la diversaj regionoj de la lando kunvenis kaj faris sufiĉe demokratan konstitucion. La sveda reĝo subskribis, kaj ĝis 1905 la du ŝtatoj havis siajn proprajn parlamentojn, proprajn registarojn, propran armeon, propran militŝiparon, propran oficistaron, propran unstrusistemon. Tamen, ĉar la norvega lingvo ne estis konservita en skriba formo, oni daŭre uzis la danan, kiu estis preta en legolibroj, religiaj tekstoj kaj juraj dokumentoj. Dum tiu jarcento oni multe plibonigis instruadon kaj konstruis lernejojn. La rezulto estis, ke la skriba dana lingvo fariĝis eĉ pli forta post la politika rompiĝo ol antaŭe. Tiu nekontentiga situacio ne povis daŭri. Tio estas la komenco de la lingva batalo, kiu ankoraŭ daŭras.

Norvegio estas longa lando per valoj fendita. Tial ni havas ege multajn dialektojn. Estas malfacile akceptigi devigan ortografion kaj gramatikajn formojn. La dana skriba lingvo havas nur du gramatikajn genrojn. La norvega havas tri. En certaj sociaj tavoloj oni konservis danan skribmanieron kaj prononcon bazitan sur ĝi, kaj oni forte batalis kontraŭ inaj gramatikaĵoj, kaj nedanaj deklinacio kaj konjugacio.

Du personoj estas precipe menciindaj pro ilia influo sur la lingva evoluo: Knud Knudsen kaj Ivar Aasen.

Knud Knudsen (1812-1895), filo de malriĉa subfarmisto, akiris universitatan diplomon kaj fariĝis instruisto en liceo en Christiania (Oslo). Li adoptis lingvopolitikan programon bazigi la skriban norvegan lingvon sur la jam uzata dana lingvo, kaj de jaro al jaro grade norvegigi ĝin per adopto de aparte norvegaj vortoj kaj norvegaj formoj en konjugacio kaj deklinacio. Mankas al la dana lingvo vortoj pri la norvega naturo, ĉiutaga vivo en laboro kaj en libertempo en valoj, inter

montoj, kaj en fiŝistaj medioj laŭ la longa rokoplena marbordo. La elparolo estus tiu de la popolo mem. Rilate "popolon" li pensis pri ordinaraj iom edukitaj personoj. Tial li agnoskis sociolektojn kiel la ĉefan bazon por nacia lingvo. Malgraŭ tio li aspektis tro radikala al konservemuloj, kaj forta lingva batalo eksplodis sekvata de insultvortoj je ambaŭ flankoj, stato kiu bedaŭrinde ankoraŭ daŭras.

Bokmål ("Librolingvo") estas nun unu el niaj du oficialaj lingvoj, kaj ĝi baziĝas sur la programo de Knud Knudsen. Pro la multaj malsimilaj dialektoj ĝi estas tre libera, permesanta grandan nombron da dialektaj vortoj, parolmanieroj, elekto inter diversaj konjugaci-sistemoj, uzado de ina genro k.t.p. En la tridekaj jaroj oni preskaŭ neniam aŭdis en la radio vere popolan parolmanieron. Hodiaŭ tio estas la normala. Originaj dialektoj kaj sociolektoj estas samrajtaj. *Bokmål* estas vera norvega lingvo, kaj la similecon al la dana kaŭzas la komuna origino. Aldone estas menciinda ke Knud Knudsen komencis la lukton kontraŭ la nenecesa uzado de la tiel nomataj fremdaj vortoj el neskandinava origino, eldonante grandan vortaron en kiu li proponis nordajn vortojn anstataŭ tiuj, kiuj enŝteliĝis el nenordaj lingvoj. Hodiaŭ demokratece superrigardas la lingvan evoluon la «*Norsk språkråd*» (Norvega lingvo-komitato), kies bultenon (*Språknytt*) oni povas senpage aboni ĉe la adreso: Norsk Språkråd, Postboks 8107 Dep, N-0032 Oslo 1).

Ivar Aasen (1813-1896), filo de malriĉa kamparano kaj fiŝisto, estis aŭtodidakto. Tamen li fariĝis unu el la plej grandaj lingvistoj pri nordĝermana filologio. Li vidis, ke troviĝas tri tempoperiodoj en la evoluo de la norvega lingvo:

1. *Gamalnorsk* – malnova mezepoka norvega lingvo, konservita en norvegaj kaj islandaj tekstoj, ĝis proksimume 1350;
2. *Mellomnorsk* – mezperioda norvega lingvo, ĉefe parolata, pli kaj pli branĉiĝanta en dialektoj kaj grade perdanta la mezepokan ĝermanan gramatikan formsistemon, ĝis proksimume 1537, la jaro de la ŝanĝo de religio;

3. *Nynorsk* – la novnorvega lingvo, konsistanta el la dialektoj parolataj en ĉiuj partoj de la lando, dum la periodo de la 16-a jarcento ĝis hodiaŭ, sen skriba normo.

Ivar Aasen volis tute forĵeti la danan lingvon kaj fari (fakte kolekti) novan skriban lingvon bazitan sur la plej disvastigitaj puraj dialektoj, kaj samtempe li konservis plejeble la konekton kun la mezepokaj ortografio kaj gramatiko. La norvega *Storting* (Parlamento) asignis al li specialan salajron, kiun li ricevadis dum la resto de sia vivo. En 1848 li eldonis sian gramatikon, riĉan je referencoj al dialektaj formoj kaj al aliaj ĝermanaj lingvoj, krom al la mezepoka norvega. Mia ekzemplero enhavas 371 paĝojn. Vortaron li eldonis du jarojn poste. La eldono en mia posedo nombras 976 dukolumnajn paĝojn kun po 63 linioj. Al ĉiu kapvorto estas donita serio de dialektaj formoj kaj ties etimologio. Tiu lingvo nun havas la nomon *Nynorsk*, same kiel la lingvohistoria periodo.

La uzantoj de *Nynorsk* havas la duonon de sia reprezentantaro en la *Norsk Språkråd.* Tamen *Bokmål* disponas la pli fortan pozicion el tiuj du lingvoj. Nia *Storting* decidis ke *Nynorsk* okupu 20 % de la programoj en radio kaj televido. Lernolibroj estu eldonataj en ambaŭ lingvoj samtempe. Ambaŭ lingvoj estas instruataj en la bazaj lernejoj kaj en la liceoj. Je la fina ekzameno de liceoj, la lernantoj devas plenumi skriban ekzamenon en ambaŭ lingvoj. Publikaj oficistoj devas respondi en la sama lingvo en kiu leteroj al ili estas skribitaj.

Jen kelkaj ekzemploj pri la strukturo de la nuna norvega lingvo, en singularo, ĉar la du lingvoj esence konsistigas nur unu saman lingvon:

NYNORSK		**BOKMÅL**
Substantivoj virgenraj:		
hane (virkoko)	– *hanar* (virkokoj)	*hane – haner*
hest (ĉevalo)	– *hestar* (ĉevaloj)	*hest – hester*
gjest (gasto)	– *gjester* (gastoj)	*gjest – gjester*
fot (piedo)	– *føter* (piedoj)	*fot – føtter*

Substantivoj ingenraj:

kone (ino)	– *koner* (inoj)	*kone – koner*
bru (ponto)	– *bruer* (pontoj)	*bru – bruer*
elv (rivero)	– *elvar* (riveroj)	*elv – elver*
bok (libro)	– *bøker* (libroj)	*bok – bøker*

Substantivoj neŭtraj:

auge (okulo)	– *auge* (okuloj)	*øye* øyer/øyne
skip (skipo)	– *skip* (skipoj)	*skip – skip*

Nedifinaj artikoloj en la tri genroj:

ein – ei – eit — *en – ei/en – et*
(vira – ina – neŭtra)

Difinaj artikoloj, sufiksigitaj kiel kutime en nordaj lingvoj:
hanen – kona – skipet — *hanen – kona/konen – skipet*
En pluralo:
hanane – konene – skipa — *hanane – konene – skipa/skipene*

Adjektivoj en la tri genroj:

rik (riĉa) *– rik – rikt* — *rik – rik – rikt*
stor (granda) *– stor – stort* — *stor – stor – stort*

Komparacio:

rik – rikare – rikast — *rik – rikere – rikest*
stor – større – størst — *stor – større – størst*

Numeraloj:

ein – ei – eitt (unu; en la tri genroj) — *en – ei/en – ett*
La ceteraj numeraloj estas identaj en la du lingvoj:
to – tre – fire – fem – seks – sju – åtte – ni – ti

Pronomoj personaj:

eg	(mi)	*jeg*
meg	(min)	*meg*
du	(ci)	*du*
deg	(cin)	*deg*
han	(li)	*han*
han	(lin)	*han*
ho	(ŝi)	*hun*
henne	(ŝin)	*henne*
vi	(ni)	*vi*
oss	(nin)	*oss*
de	(vi)	*dere*
dykk	(vin)	*dere*
dei	(ili)	*de*
dei	(ilin)	*dem*

Posedaj formoj:

min (mia) – *mi* – *mitt*	*min – mi –mitt*
din (cia) – *di* – *ditt*	*din – di – ditt*
hans (lia)	*hans*
hennar (ŝia) *	*hennes*
vår (nia) – *vår* – *vårt*	*vår – vår – vårt*
dykkar (via)	*deres*
deira (ilia)	*deres*

Pronomoj nedifinaj havas neregulan deklinacion, kaj malsimilas en la du lingvoj precipe en vokaloj. La neŭtra finaĵo estas plej ofte **t`**.

Tiel nomataj **malfortaj verboj:**

krevja – krev – kravde – kravd (postuli – postulas – postulis – postulinta)	*kreve – krever – krevde – krevd*
flira – flirer – flirte – flirt (ridi – ridas – ridis – ridinta)	*flire – flirer – flirte – flirt*
hoppa – hoppar – hoppa – hoppa (salti – saltas – saltis – saltinta)	*hoppe – hopper – hoppa/hoppet – hoppa/hoppet*
snu – snur – snudde – snudd (turni – turnas – turnis – turninta)	*snu – snur – snudde – snudd*

Tiel nomataj **verboj fortaj:**

bita – bit – beit – biti (mordi – mordas – mordis – mordinta)	*bite – biter – bet – bitt*
bryta – bryt – braut – broti (rompi – rompas – rompis – rompinta)	*bryte – bryter – brøt – brutt*
drikka – drikk – drakk – drukki (trinki – trinkas – trinkis – trinkinta)	*drikke – drikker –drakk – drukket*
finna – finn – fann – funni (trovi – trovas – trovis – trovinta)	*finne – finner – fant – funnet*
lesa – les – las – lesi (legi – legas – legis – leginta)	*lese – leser – leste – lest*
taka – tek – tok – teki (preni – prenas – prenis – preninta)	*ta – tar – tok – tatt*
blåsa – blæs – bles – blåsi (blovi – blovas – blovis – blovinta)	*blåse – blåser – blåste – blåst*

Infinitiva signo estas **å`**, kiu lokiĝas antaŭ la verbo:

Helpverboj por tempo estas du:

hava – hev – hadde – hatt *ha – har – hadde – hatt* (havi – havas – havis – havinta)	*ha – har – hadde – hatt*
vera – er – var – vori (esti – estas – estis – estinta)	*være – er – var – vært*

Ambaŭ lingvoj perdis la **fleksiojn** en persono kaj nombro.
Nynorsk konservis la akordon en genro kaj nombro kaj inter perfekta participo kaj substantivo.
Bokmål perdis la akordon en genro.

Tiu ĉi superrigardo estas supraĵa. La diferenco inter radikalaj kaj konservativaj formoj estas multe pli granda ol mi montris ĉi tie. Tre granda nombro da vortoj havas kromajn formojn en ortografio kaj en gramatikaj finaĵoj, kaj estas pro ili, ke la lingva batalo ofte estas tre akra. Konservativaj *Bokmål*-anoj (kiuj starigis propran organizon) forte batalas kontraŭ la konjugacio *hoppe – hopper – hoppa – hoppa* (salti); kontraŭ inaj formoj de substantivoj, kiujn ili deklinacias kiel la viraj; kontraŭ la uzado de preteritaj participoj de la fortaj verboj; kaj kontraŭ la difina substantiva formo neŭtra plurala *skipa* **`. Estas ĉefe la vokalo a**, kiun ili atakas. Tiuj formoj estas tiuj, kiuj plene malsimiligas la hodiaŭn *Bokmål* de la skriba lingvo en la frua duono de la 19-a jarcento.

De la alia flanko oni provas konservi la originajn norvegajn formojn, kaj *Nynorsk* pli fidele provas eviti nenecesan uzadon de fremdaj vortoj. *Nynorsk* estas ja pli kampara, kaj *Bokmål* pli urba. Preskaŭ ĉiuj norvegoj parolas dialektojn, kiuj estas meze inter la du oficialaj lingvoj, eĉ en la urboj.

La adreso de la aŭtoro: Lillebo, N-3300 Hokksund (Norvegio)

Forumo

Ĉu ekzistas "hungarsperanto"?

En la *Akademiaj Studoj* [Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, p. 40-44] aperis kontribuaĵo al la dialektologio de Esperanto, verkita de Bernard GOLDEN. La verkinto, kiu estas eksterlandano loĝanta en Hungario, havas okazon sekvi la Esperantan lingvouzon de Hungaroj, kaj en skriba kaj en parola lingvaĵo. Kolektinte kelkajn — laŭ lia opinio karakterizajn — erarojn de Hungaroj, li alvenas al la kategoria konstato, kvazaŭ la Hungaroj parolus iun 'dialekton' de Esperanto, de li nomatan (iom cinike) "hungarsperanto". Ĉar tiu lia konstato estas ne nur ofenda por tiu nacio, kiu gastigas lin, sed estas danĝera (ĉar tute similajn "sperantojn" oni povus trovi ankaŭ ĉe aliaj nacioj!) ni devas fari kelkajn rimarkojn kaj ĝustigi iomete liajn troigojn.

1. Eble sinjoro GOLDEN aŭdis ion pri la *interfero,* t.e. pri la interĝenado de du konfliktantaj lingvoj. Tio, kion li kolektis, estas similaj eraroj de iuj (ĉu Hungaroj aŭ ne), kiuj malbone regas la lingvon kaj faras erarojn. Ni kolektis tiujn specifajn erarojn de Hungaroj por konstrui la didaktikan "erar-gramatikon" de Hungaroj. Ili estas sufiĉe multnombraj kaj ili atentigas nin pri tio, ke dum la instruado de Esperanto al Hungaroj kion ni devas pli forte ekzerci, kie estas la alergiaj punktoj de la lernata lingvo surbaze de nia gepatra.

2. Mi havis kaj havas okazon partopreni diverslandajn seminariojn, kolokvojn, simpoziojn, kie ĉeestas plur-deko da divers-lingvanoj. Mi gvidis similajn kursojn por pedagogoj en la plej diversaj landoj, kaj ĉie mi povis konstati, ke ĝis kiam iu atingas certan nivelon, la gepatra-lingva influo montriĝas en lia/ŝia lingvaĵo. Tamen, mi neniam kuraĝus paroli pri "bulgarsperanto, italsperanto, francsperanto" — kvankam laŭ la kriterioj de GOLDEN ili minimume tiomgrade ekzistas, kiel lia eltrovaĵo, la "hungarsperanto".

3. Fine mi demandas: ĉu li estas absolute konvinkita, ke tiu Esperanto, kiun li uzas, estas vere LA Esperanto, aŭ ankaŭ tio estas ia "x-sperantо"? Kaj se li estas konvinkita pri tio, ĉu li mem prijuĝis tion pri si mem, aŭ iu alia konstatis tion pri li?

Ruĝa Krajono

Nur tiu ne eraras,
kiu neniam ion faras.
[Zamenhof]

Ĉi-foje la preseja koboldo vizitis nian redaktejon kaj tre aktive enmiksiĝis en la tekstojn de la dua numero de IPR/1986. La kaŭzo — kiu klarigas sed ne pardonigas — estas, ke la redaktoro volis nepre aperigi la numeron antaŭ la 20-a Konferenco. Por sukcesi tion fari, la numero aperis sen pres-provaĵa korektado. Bonvolu korekti en via ekzemplero la sekvajn erarojn:

Paĝo	Linio	Erare	Ĝuste
1	6	des pli malmulte	des pli malmulta
2	11-12	en nia agado sur ĉiu nivelo: en la preparado de instruistoj	*forstrekenda duoblaĵo*
4	11	alparolas	alparoli
	22	siajn	ĝiajn
5	4	el la	al la
	14	kio reprezentas	kiu reprezentas
7	5	La unua fremdan	La unuan fremdan
8	6	en niajn lernejoj	en niaj lernejoj
	−5	ke ni okupiĝas	ke ni okupiĝu
9	6	tute ne estas finite	tute ne estas finita
13	15	rimedoj	rimedojn
14	−2	en daŭre	en daŭra
17		SZENT-GYÖRGY	SZENT-GYÖRGYI
19	10	sicas	scias
	20	le "eksterlernejaj"	la "eksterlernejaj"
	21	malfrotiĝas	malfortiĝas
	29	raportaĝojn	raportaĵojn
20	12	ricevus	ricevas
	25	la bruo ju pli forte	je bruo ju pli forta
21	14	bazigas	baziĝas
	15	realigas	realiĝas
	26	detalo	detale

25	4	taŭgaj	taŭga
27	25	al kiu nacia	al kiu nacio
29	17	rekomenis	rekomenciĝis
31	19	20 miljardojn	20 miliardojn
33	19	miriaklo	miraklo
	28	jaroj	jarojn
34	10	kontras	kontraŭ
	12	apreciata	aprecata
39	8	telentoj	talentoj
46	−6	sobrae	sobra
49	4	distraĵon:	disertaĵon
51	25	per elkapti	por elkapti
52	4	CEDI	CED
	15	PALLA	PALA
54	13	Estas rimarkeble, ka	Estas rimarkeble, ke
		En daŭrigo de "Prolegomeno":	
8	1	elektita	eklektika
	17	Komencsky	Komenský

Tro rapida faro,
estas nur baro!
[Zamenhof]

Je la nomo de la redakta komitato, respondeca eldonanto kaj ankaŭ de kompostisto — La Red.

• **Du labor-komisionoj de ILEI**

Dum la 20-a Konferenco fondiĝis du labor-komisionoj:
Laborkomisiono pri Lerneja Statistiko. — Gvidanto: Germain PIRLOT, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende. – Li petas ĉiujn informojn pri la oficiala instruado de Esperanto en la lernejaj sistemoj de ĉiuj landoj en la mondo. Petu de li enketilon! – Aperis de li: *Oficiala situacio de la E-instruado en la mondo*, 6-a eld. 1986. Prezo por *ne*-informinto (plus sendkostoj): Belgio 60 BF; aliaj landoj 70 BF aŭ egalvaloro. – Poŝtkonto: 000-0259390-12.
Laborkomisiono pri Didaktikaj Ludoj kaj Ludiloj. — Gvidanto: Georges SOSSOIS, Rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin. — La gvidanto atendas prezentiĝon de gekolegoj, kiuj interesiĝas pri la temo. Helpu lin!

■ **Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto.**

[Cirkulero 152, Ald. A, Nova Serio n-ro 5, Julio 1986]

Post studo kaj propono de la "Gramatika Sekcio", la Akademio voĉdone akceptis jenan rezolucion:

Prepoziciaĵo por la subjekta suplemento

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikita per **de**. Ekzemple: *ŝi estas amata de ĉiuj* [6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko].
2. Post *o*-vortoj, **de** povas indiki la aganton, se neniu alia koncernato estas ebla. Ekzemple: *la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj* [Fundamento], *la parolado de la oratoro*, k.s.
3. Por indiki la aganton post *o*-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas **fare de**. Ekzemple: *la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro, la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.*

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko, Michel Duc Goninaz,
La Prezidanto, D-ro A. Albault.

◆ **Propono al la Akademio de Esperanto**

La § 10 de la «Statuto de la Akademio de Esperanto» tekstas jene:
10. Pri la dezirindeco de la elekto de kandidato decidas en unua loko lia kompetenteco. — Pri la divido de la postenoj inter la diversaj lingvoj kaj nacioj ne ekzistas deviga regulo; sed estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj lingvoj, en la unua loko la gravaj kulturlingvoj, estu reprezentataj en la Akademio.
Ekestas la demando: kion signifas "grava kulturlingvo"? Nek la lingvoscienco, nek la lingvopedagogio konas tiun terminon. Ĉu, ekzemple, Esperanto estas "grava kulturlingvo"? Ĉu ĝuste la Akademio de Esperanto estas tiu Instituto, kiu devas enkonduki tiun terminon? Ĉu ĝuste la Akademio de Esperanto volas dividi la homajn lingvojn je "gravaj" kaj "negravaj", je "kulturaj" kaj "nekulturaj"? Kial tiaj homoj, kiel KALOCSAY, BAGHY, SZATHMÁRI, SZILÁGYI, CSEH — kies gepatra lingvo tutcerte estas kvalifikata "negrava" kaj "nekultura" — havu malavantaĝon ĉe la kandidatiĝo kontraŭ aliaj, nur pro tio, ke la alia havas "gravan" kaj "kulturan" gepatran lingvon?
La baza principo de esperantismo estas ĝuste la forigo de ĉiuspeca *lingva diskriminacio*. Estas do tragikomike, ke ĝuste Esperanto-institucio kodigas lingvan diskriminacion.

Tial mi proponas amendi tiun paragrafon jene:

10. Ĉe la elekto de kandidato gravas lia scienca kaj lingva kompetento. Estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj diversaj lingvoj estu reprezentataj en la Akademio.

Mi alvokas la Prezidanton de la Akademio prezenti tiun mian proponon al la membroj de la Akademio kaj aranĝi laŭ la statutaj preskriboj *voĉdonadon pri la statut-amendo.*
Je la nomo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj:
La Prezidanto, Prof. I. Szerdahelyi

▲ La nova estraro de UEA

elektita dum la 71-a Universala Kongreso en Pekino:
TONKIN prezidanto — UMEDA vicprezidanto — MAERTENS vicprezidanto kaj ekstera agado — SZABÓ-FELSÖ ĝenerala sekretario kaj interna agado — TEXIER interna agado — SADLER financo — DESPINEY ekstera agado — MASTERMAN interna agado — HASZPRA ekstera agado.
Dum la venontaj monatoj, la funkcioj estos precizigataj.

▼ Kongresa rezolucio pri Komisiono pri Edukado

La Komitato,
konsiderinte la interkonsenton en Aŭgsburgo inter la estraroj de UEA kaj ILEI, por intensigi la rilatojn inter la du asocioj,
proponas starigi unuecan komisionon pri edukado kaj ekzamenoj (lingvaj kaj instrumetodikaj) kies anoj estu samtempe membroj de ILEI por ke la komisiono povu servi kiel ponto inter la du organizaĵoj, tiel ke ILEI prizorgu la fakan enhavon de ĉiuj projektoj kaj la efektivigo estu komuna afero de UEA kaj ILEI;
rekomendas ke la lingvaj ekzamenoj (1-a kaj 2-a gradoj) de UEA estontece venu sub la komunan kompetenton de UEA kaj ILEI;
instigas ILEI prilabori regularon kaj postularon por la 3-a grado;
konstatas ke dum la ĵusa 20-a Konferenco de ILEI tiu organizo akceptis la program-projekton por la edukado de E-kursgvidantoj kompilitan fare de la Eduka Komisiono de UEA;
trovas bezonate okazigi ĝis la venonta UK eksperimentan metodikan kurson internacian por ekzameni la realigeblon de la projekto kaj, surbaze de la spertoj, aranĝi definitivan programon:
rekomendas eldonon, nome de UEA kaj ILEI, de novtipa atestilo pri instrurajto en metodikaj kursoj laŭ la menciita programo;
proponas aperigi en iu eldonserio de UEA la pedagogiajn librojn kaj broŝurojn, kiujn ILEI preparas kiel helpilojn por la diversaj kursoj kaj ekzamenoj;

emfazas la rolon de pedagogiaj kaj lernejaj periodaĵoj kiel la «Internacia Pedagogia Revuo» kaj «Juna Amiko», kaj la neceson aperigi regule informojn pri ili en la organoj de UEA;
atentigas la Estraron pri la neceso finance helpi ILEI en la realigo de la komunaj projektoj;
taskas la Estraron oficiale informi ĉiujn Landajn Asociojn pri la novaj rilatoj inter UEA kaj ILEI, petante ilin aktive kunlabori kun la landaj ILEI-sekcioj;
insistas ke UEA kaj ILEI daŭre informu unu la alian pri aktualaj demandoj rilate al edukaj kaj ekzamenaj aferoj.

La Komisiono:
BARCSAY Zsuzsa, MACGILL Stefan, SZANSER Irena, SYMOENS Edward, TIŠLJAR Zlatko

Ĉar ekzistis tajp- kaj fotokopi-problemoj, tiu ĉi rezolucio kaj pluraj aliaj ne estis pridiskutata; la komitatanoj skribe voĉdonos pri ĝi.

▼ Pola Kibernetika Asocio

[Polskie Towarzystwo Cybernetyczne, Afiliowane przy Polskiej Akademii Nauk, Zarzad Główny, Mokołowska 24, PL-00-561 Warszawa]

La Sekcio de Kibernetiko Pedagogia funkcias enkadre de la Pola Kibernetika Asocio ekde 1974. Ĝia unua Simpozio okazis en 1979, la dua en 1984. La trian Simpozion la organizantoj deziras plivastigi je internacia sfero, invitante specialistojn kaj sciencistojn el diversaj landoj.

1. Problemarsekcioj:
- Aplikado de kibernetiko en didaktiko
- Aplikado de kibernetiko en edukado
- Kibernetikaj funkcioj de teknikaj rimedoj kaj materialoj por instruado
- Kibernetiko en la klerigado de instruistoj, konstanta perfektigado kaj organizado de edukado

2. Laborlingvoj:
– Angla, Esperanto, Germana, Rusa

3. Partoprenkondiĉoj:
– La partoprenantoj mem kovras ĉiujn siajn kostojn
– Ili alsendu siajn tekstojn (en du ekzempleroj) kun duonpaĝaj resumoj

4. Publicaĵoj:
La simpoziaj materialoj aperos libroforme. La tekstoj de la referaĵoj ne estu pli longaj ol 12 paĝoj

5. Limdato:
Pro eldonaj kialoj la tekstoj de la referaĵoj estos akceptataj *nur ĝis 30-10-1986*

6. Organizado:
"Sekcio de Pedagogia Kibernetiko de la Pola Kibernetika Asocio", str. Mokotowska 24, PL-00-561 Varsovio – Tel. 25.77.99

7. Korespondadresoj:
– por *esperantlingvanoj*: D-ro Tadeusz Ejsmont, B. Bartoka 1/49, PL-92-547 Łódź
– por *alilingvanoj*: D-ro Inĝ. Leonard Rojewski, Obozowa 61/91, PL-01-418 Varsovio.

● **Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio (TEBA)**

TEBA baldaŭ komencos la trian jaron de sia ekzisto. Ĝia laboro estas plurflanka: la Asocio kunligas kaj servas tiujn esperantistojn, kiuj profesie laboras en ĉiaspeca biblioteko; same ĝi kunligas kaj servas la posedantojn kaj prizorgantojn de Esperanto-biblioteko aŭ Esperanto-kolekto nacia, internacia, privata, aŭ tute persona. Trie, ĝi laboras por la diskonigo de Esperanto inter la neesperantista bibliotekistaro. — Ni proponas plurajn servojn. Inter ili estas:

Terminologia Servo. – Nia nordamerika sekretario Doug Portmann (P.O.Box 124, New Martinsville, WV 26186, Usono) kompilas Esperantan terminaron bibliotekan, kaj volonte kontaktas kun ĉiu ajn persono tiurilate.

Konsila Servo. – Esperantisto, ne profesia bibliotekisto, kiu trovas sin antaŭ la devo prizorgi Esperanto-bibliotekon, eĉ malgrandan, foje hezitas pri la ĝustaj labormetodoj. Niaj du sekretarioj estas profesiaj bibliotekistoj kaj volonte donas konsilojn.

Libra Servo. – Kiu serĉas librojn malfacile akireblajn, kiu volas vendi, donaci aŭ interŝanĝi librojn nebezonatajn, tiu kontaktu nin, kaj la dezirojn ni diskonigos en nia Bulteno, aŭ alimaniere prizorgos.

Revuo. – TEBA ĵus aperigis la unuan numeron de sia «Biblioteka Bulteno», kiu fine aperos kvaronjare. En ĝi aperas artikoloj interesaj por ĉiu libroŝatanto, aktualaj informoj bibliotekaj, rubriko terminologia, kaj foje recenzoj.

TEBA, kies ĝenerala sekretario estas Geoffrey King, urĝe bezonas pliajn membrojn por efektivigi ĉiujn siajn servojn. La jara kotizo estas £ 5.50, $ 8.00, DM 22.00, aŭ egalvaloro, ĉe unu aŭ alia el la sekretarioj. Ankaŭ ĝenerala informilo estas senpage havebla.

Skribu al: Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britujo.

■ **Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo**

Unuafoje la franca ŝtat-organizaĵo *Chambre de Commerce de la Meuse* (Komerca Ĉambro de la Moz-regiono) uzis Esperanton najbare al la franca, angla kaj germana lingvoj en oficiala eldonaĵo.

Tiu inciato aspektas al ni ege grava por la disvastiĝado de la internacia lingvo, specife sur la tereno de la komercaj interŝanĝoj. Ni esperplene deziras, ke via revuo amplekse informu pri tiu realigaĵo, indikante ke ĉiu interesato povas ricevi unu ekzempleron kontraŭ sendo de 10 internaciaj respond-kuponoj al la ĉi-posta adreso: Chambre de Commerce de la Meuse, Parc Bradfer, F-55000 Bar-le-Duc.

Sinjoro GILBERT, Direktoro de la organizaĵo kaj ankaŭ estrarano de nia IKEF, devas esti kapabla pruvi al ĉiuj skeptikemuloj, ke Esperanto

indas por roli en tiu sfero! Por atingi tiun celon, li petas havigon de almenaŭ unu fotokopio de ĉiu artikolo pritraktanta tiun ĉi iniciaton. Por li ankaŭ gravas la reagoj de legantoj, kaj tio laŭ la plej granda nombro.

F.J. Braun, prezidanto de Mondkomerca Eldonejo Esperantista

GRAVA ALVOKO AL ĈIUJ INSTRUISTOJ!

Dum la 21-a Konferenco de ILEI ni intencas aranĝi du **ekspoziciojn**:

1. Ekspozicio de infandesegnaĵoj, kun temo «Esperanto Centjara»
2. Ekspozio de lernolibroj, lerniloj, instrumetodaj verkoj, infan-literaturo.

La partoprenantoj povas kunporti persone la materialon al la Konferenco. Tiuj, kiuj ne partoprenos la Konferencon, estas petataj sendi sian materialon al la Vicsekretario: Marin BAĈEV, Pf. 1054, BG-1000 Sofio. — La librojn ni resendos post la Konferenco. La plej bonaj infandesegnaĵoj estos premiotaj!

Librobreto

LIBROJ POR NIAJ LERNANTOJ

Dum la Universalaj Kongresoj oni ĉiam havas librovendejon. En Aŭgsburgo la kongresanoj havis treege grandan eblecon elekti inter la vere multaj novaj kaj malnovaj eldonaĵoj. Inter la novaj mi trovis libron kun longa titolo: *Kion travivis aŭstria familio en la brazila praarbaro*, verkita de la iama membro de ILEI, s-ino Erika Linz, kiu mortis en 1984. Subtitolo: "31 rakont-leteroj al infanoj, al Esperanto-klasoj kaj al plenkreskuloj en la tuta mondo". Mi volas informi pri tiu ĉi interesa libro en IPR, por ke ĝi trovu la vojon ĝuste al infanoj, al Esperanto-klasoj kaj al plenkreskuloj en la tuta mondo. — Bleicher Eldonejo, D-7016 Gerlingen. Prezo: 24 germ. markoj. *O. Olsson*

Du ĉarmajn infan-libretojn

eldonis la Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ambaŭ verkitaj de Shel SILVERSTEIN kaj esperantigitaj de SO GILSU:
La sindonema arbo, Seŭlo 1983, 59 p.;
Mi serĉas mian perditan..., Seŭlo 1983.
Havigu ilin por viaj lernantoj! Adreso de la tradukinto: Sodemun, P.K. 59, Seulo 120.

Eldonaĵoj de Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb:

Cooper J.F. & Imbert R. – *La Sentimulo*, 2-a eld., red. Z. Tišljar, 72 p.

Valano Johan & Ivezič Vjekoslav, *Kiu estas Jozefo?*. – Bildstria rakonto en facila Esperanto, 1984, 18 p.

Eldonaĵo de Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Poŝtĝirkonto 16.26.26:

Joĉjo, la amiketo de Elza Otto. – Legolibro por komencantoj, 96 p.

Esperanto-Instruantoj !

La plej bona rimedo por ekzerci Esperanton por viaj lernantoj estas la internacia lerneja Esperanto-revuo «Juna Amiko». Aperas trifoje jare. Mendebla ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. — Abonprezo: 5,70 gld.

SELTEN Reinhard & POOL Jonathan: **Ĉu mi lernu Esperanton?** – Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj (*Symmetric Equilibria in Linguistic Games*), Marto 1982, Universität Bielfeld/IMW, «Working Papers of the Institute of Mathematical Economics; Arbeiten aus dem Institut für Mathematische Wirtschaftsforschung», n-ro 112. — Adreso: Universitätsstr., D-4800 Bielefeld 1 (FRG).

Ĉi tiu studaĵo, verkita por la aktivistoj de la Esperanto-movado, analizas la kialojn de la decido lerni aŭ ne lerni Esperanton, aplikante la ludoteorion al ĉi tiu problemo. La aŭtoroj kreis simplan modelon de la lingva situacio en la mondo. En ilia modelo ekzistas pluraj denaskaj lingvoj kaj unu interlingvo, Esperanto. La homoj en la modelo havas po unu denaskan lingvon, kaj ili povas decidi lerni la denaskan lingvon de unu el la kunludantoj, Esperanton, aŭ neniun.

La celo de la ludoteoria analizo estas ekscii kiun strategion ĉiu ludanto elektas. Ĉiu nedenaska lingvo postulas iun lernokoston sed samtempe donas al la ludanto iun komunikan gajnon. La decido de unu homo povas efiki je la komunika gajno de aliaj; oni ne povas scii kiu decido estas la plej bona por iu, se oni ne scias la decidon de aliaj. Kiam ĉiuj ludantoj havas la strategiojn, kiuj estas iliaj respektivaj plej bonaj respondoj al ilia situacio en la sama momento, la ludoteorio nomas tion *ekvilibro.*

Esperanto povas ludi gravan rolon en ekvilibraj situacioj, ĉar la kosto por lerni ĝin estas sufiĉe malalta kompare al la kosto por lerni la lingvon de unu el la grupo.

La varbantoj por Esperanto deziras ŝanĝi la mondon tiel, ke multaj homoj lernu Esperanton kaj malpli multaj lernu gentajn lingvojn. Ili deziras ankaŭ, ke la lingvolernado estu simetria. Ĉi tiu analizo donas apogon al la ideo, ke tiaj deziroj estas principe kontentigeblaj. SELTEN kaj POOL trovis kondiĉojn, ĉe kiuj ekzistus stabilaj ekvilibroj kun samproporcia reciproka lingvolernado inter du grupoj kaj kun samproporcia Esperanto-lernado ĉe ties anoj. Ili faris analizon pri nur du grupoj. Sed ju pli da grupoj ekzistas, des malpli valoras la grupa lingvo de ĉiu ajn unuopa grupo kompare kun Esperanto. En iuj situacioj oni atingus punkton, ekde kiu la avantaĝoj de Esperanto-scio sufiĉus por instigi ĉiujn ceterajn lerni ĝin.

La aŭtoroj provas imagi konkurencon inter la plej granda gruplingvo kaj Esperanto, sed en ĉi tiu studaĵo ili ne tuŝas la diversajn potencialojn de denaskaj lingvoj; tiu temo povus ŝanĝi iliajn konkludojn kaj pliriĉigi la komprenon pri lingvaj decidoj. *K. Kisfaludy*

Instruistoj pri matematiko atenton!

Jen du fakaj helpiloj nepre akirendaj:

KISELMAN Christer O. – *Matematika terminaro Esperanto-angla-franca-sveda.* Eld. de Upsala Universitato, Matematika Instituto; 30 p. — Mendebla ĉe: Uppsala University, Department of Mathematics, Thunbergsvägen 3, S-75238 Uppsala.

REIERSØL Olav – *Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto,* Statistical Memoirs, Institute of Mathematics, University of Oslo, n-ro 2, junio 1985. ISBN 82-553-0583. 40 p. — Mendebla ĉe la aŭtoro: Torødveien 109, N-3135 Torød.

Pri ambaŭ verkoj ni atendas viajn recenzojn!

Modela prezento de Esperanto-gramatiko en nacia lingvo:

TANGERUD Odd & Tom Arbo HØEG, *Esperanto-grammatik*, 2-a eldono, Oslo 1986.

Oni ofte demandas: kiel prezenti Esperanton al la vasta publiko en konciza, klara, tamen serioza, popular-scienca formo, tiel, ke la neesperantista publiko akiru fidelan bildon pri la Internacia Lingvo? Jen ekzemplo de tia verko, tradukinda kaj adaptinda al aliaj etnaj lingvoj. — Mendu ĝin ĉe la aŭtoro: Odd Tangerud, Lerberg, N-3300 Hokksund.

MARIANO Michele, *Sisteme Ordigita Vortaro.* – Eld. Lina Trenner-Gabrielli, 166 av. Daumesnil, F-75012 Paris 12. – Poŝtĝirkonto 39.41.39 T-Paris. Prezo: 86 gld.

Temas pri verko fundamenta, kiu reprezentas gravan kontribuon al la Esperanto-Movado kaj al ties kulturo, pri la scienco ĝenerale kaj aparte lingvistiko. Sed tiu ĉi impona laboro de pli ol 420 paĝoj, krom la alfabeta indekso, por kiu d-ro Michele Mariano neniel ŝparis sian tempon kaj forton, postulis ankaŭ grandan moninveston.

La meritoj de tiu ĉi aŭtoro estas tiel konataj, ke ni kuraĝas konsili al

vi la aĉeton de almenaŭ unu ekzemplero; ni estas certaj, ke vi ne volas preter-atenti tiun gravan okazintaĵon.

La esplorantoj de lingvistiko povos trovi en ĝi multe da ellaboreblaĵoj por estonta plivalorigo de la semantika prezentado. Vi mem povas esti unu el tiuj esplorantoj, kaj post konsulto de la verko vi konvinkiĝos, ke ĝi meritas plenajn konsenton kaj interesiĝon. *L. Gabrielli*

Adreso de la aŭtoro: Michele Mariano, Via Casalis Lingua 7, I-12038 Savigliano.

MACGILL Stefan, *Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ!* – Eld. Stafeto, 1986. 88 paĝoj de aŭtentika Esperanta humuro: pri la movado, nia lingvo, ĝia movado, nia literaturo, niaj strangaj kutimoj, pri la mondo, ĝiaj lingvoj, ĝia moviĝo, kaj same strangaj kutimoj. – Prezo ĉe UEA: 9,30 gld. (7,75 rabate); ĉe FEL: 168 BF (140 rabate)*.

Jen skriba adaptiĝo de la skeĉoj kaj monologoj, kiujn podie prezentis Steĉjo dum la lastaj dek jaroj:
La hotelĉambro: Principe ekzistas fenestro, sed kiu scias trovi ĝin?
Vortordo: Iom konfuza kun pledo por ortodokseco en Esperanto.
Fonetika interpunkcio: Revolucia bonigo por plilogikigi nian lingvon.
Semantika inflacio: Nia lingvo en danĝero pro ekonomiaj problemoj.
Neceseja papero: Praktika gvidilo por organizantoj de renkontiĝoj.
Regulintervalaj krozraketoj: Du belgaj komputiloj intimiĝas... Ve!
Ci kaj vi: La riskoj de pronoma konfuzo civigitaj ... ne: vicigitaj.
Mia Mimo: Brila propono por sukcesa radio-programo.
Statuta futbalo: Por ŝpari tempon dum la IJK oni komencas kombini

---

* Ĉe FEL kaj UEA samtempa mendo de 3 ekzempleroj rajtigas la indikitan rabaton. Ĉe UEA aldoniĝas 10 % (min. 5 gld) por sendokostoj. Ĉe FEL aldoniĝas la veraj sendokostoj (ĉ. 50 BF ĝis 1 kg). — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; poŝtkonto 378964. — FEL (Flandra Esperanto-Ligo), Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen; poŝtkonto 000-0265338-43.

iujn programerojn. Ĉeestu la unuan komitatkunsidan futbalmatĉon!
Tradukado paralela: Ankaŭ la interpretisto faras sian kontribuon al nia komuna strebado porti pacon en la mondon, ĉar ŝajnas ke la diplomatoj iom fuŝas la aferon.
PLUS: vortludoj, anagramoj, unikaj poemetoj, informriĉaj piednotoj, sinsekva paĝnumerado, ilustraĵoj, 2 fotoj kaj laŭlanda indekso...

Sciencistoj serĉataj

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino aperigos, kiel kontribuon al la centjariĝo de la Internacia Lingvo, dokumentaron pri vivantaj sciencistoj (*Internacia Scienca Kolegaro*), kiuj komprenas — almenaŭ skribforme — ĉi tiun nian preferatan laborlingvon. La necesaj informoj estas bezonataj sur speciala demandilo (havebla ĉe la AIS-sekretariejo) antaŭ la 15a de decembro 1986. Jam alvenis ĉ. 600 tiaj "pripersonaj informiloj"; ĉia kompletiga helpo estas bonvena!

Ĝis la 15a de decembro AIS intencas ankaŭ kompletigi la serion de siaj unuaj alvokoj de efektivaj membroj. Serĉataj estas ĉiuj universitatnivelaj profesoroj kaj docentoj, kiuj jam kontentige regas la Internacian Lingvon. Kiel adjunktaj membroj estas alvokeblaj ankaŭ universitataj aŭ eksteruniversitataj sciencistoj kun nur pasiva ILokono. La efektiva aŭ adjunkta membreco ne devigas al kotizpago!

AIS krome invitas ĉiun, kiu kompletigis minimume dujaran laŭregulan universitatnivelan fakstudon per ŝtata aŭ universitata ekzameno, kandidatiĝi dum unu de la venantaj "Sanmarinaj Universitataj Sesioj" (SUS) por la "adapta adoptigo" de sia titolo aŭ akademia grado. La tiel akireblaj gradoj (*Bac.sc. / Mag.sc. / Dr.sc. / ... kaj Dr.sc. ... habil.*) estas latinforme agnoskataj en la Respubliko de San Marino. Limdato por kandidatigo dum SUS 4 (1987-03-28 ĝis 04-06) estas la 15a de decembro 1986, kaj por SUS 5 (1987-08-29 ĝis 09-07) la 3a de aprilo 1987.

AIS-Sekretariejo: Kleineberger Weg 16B, D-4790 Paderborn.

Alvoko

Dokumento «Lerneja projekto»

La epiteto "lerneja" klarigas, ke la dokumento servu al uzado en lernejoj kaj alportu utilon al la edukado de gelernantoj. "Projekto" ĝi estas, ĉar ĝia formo ne estas definitiva, kaj eĉ ne povas fariĝi definitiva. Ni prezentas modelon, elirdokumenton, kiu estu kiel eble plej multfoje ŝanĝata, laŭeble plibonigata.

Origine la dokumenton verkis en la angla lingvo profesiaj instruistoj, sub la sperta kunordiga agado de S-ro Brown (Londona Esperanto-Klubo). La celo de la instruista teamo estis krei aron da lecionoj — de la laboriga speco, ne nur por la instruistoj, sed ankaŭ por la infanoj! — kiuj atentigas pri la lingvo-problemoj en la mondo. La projekto estu uzebla ne nur en lingvaj kursoj, sed ankaŭ en aliaj fakoj, kiel ekzemple historio, geografio, socia edukado k.t.p.

Tiel, la enkonduko al Esperanto situas en pli ĝenerala edukado al mondcivitaneco. La projekto tuŝas rekte la plej gravan agadkampon de UNESKO, la interhoman, -popolan, -kulturan interkompreniĝon. Tiu ĉi temo estas nur malmulte ellaborita, kompare kun aliaj problemkoncernaj, atentobezonaj temoj, kiel la militoj, la subevoluiĝo, kaj la detruado de la vivmedio.

La Rezolucio de UNESKO en 1954 rekonis la rezultojn, atingitajn pere de la Internacia Lingvo Esperanto kaj rekonis ĝian movadon.

La Rezolucio de UNESKO en 1985 invitas la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto i.a. per la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo.

Okaze de la inaŭguro de la 20-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (12–19/7/1986) la prezidantoj de ILEI (D-ro Szerdahelyi) kaj de Universala Esperanto-Asocio (S-ro Maertens) esprimis deziron pri intensiva kunlaborado. La libera tradukaĵo estas unu el la fruktodonaj rezultoj tiurilate.

Viaj reagoj pri spertoj ĉiam estos bonvenaj je la konstante aganta servestro: André STAES, Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (Belgio). Ankaŭ la anglalingva kaj Esperanta materialoj estas tie mendeblaj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Tre ofte ni konstatas, ke homoj lernas Esperanton, kelkaj eĉ korekte, sed post kelkaj monatoj ili forlasas la lernadon kaj ... la movadon.

Ĉu la kursgvidantoj sufiĉe atentigas siajn gelernantojn pri la fakto, ke unu el la unuaj ŝtupoj en plifortigo de la lingvo-kono kaj praktika uzado de la lingvo estas korespondado kun alilingvanoj? UEA provizas specialan Korespondan Servon, moderne ekipitan, kiu estas je ĉies dispono por trovi konvenajn korespondemulojn.

Nepre uzu tiun eblecon por viaj lernantoj kaj informiĝu ĉe ĝia direktoro: Robert Llorens, Les Hortensias 2, 121 b Boulevard Napoléon III, F-66200 Nice.

Noto: K.S.M. respondas nur al tiuj, kiuj aldonas al sia peto 2 internaciajn korespondkuponojn.

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Szerdahelyi István, Universitato ELTE/BTK, H-1364 Budapest, Pf. 107
Vicprezidanto : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
Sekretario : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
Vicsekretario : Bâcev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
Kasisto : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (N, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo : Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : ĉe E.T.A., Kinburn House, Egham Hill, Egham, Surrey TW 20 0BD
Ĉinujo : Zhang Danchen Huazhong, Normala Universitato, Hubei, Wuhan
Danujo : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim (provizore)
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Lilienthalstr. 3, D-6900 Augsburg
Grekujo : K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, Strato Pyrou 28, GR-11635 Ateno
Hispanujo : Manuel López Hernández Mata, 21, 2° izq. 41.002 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Josef Murĵan, P.K. 1289, IL-61012 Tel Aviv
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : John C. Birmingham Jr, 5201 Patterson Ave, Richmond VA 23226, USA
Norvegujo : Rolf Anda, N-4343 Orre
Pollando : Irena Szanzer, Lewartowskiego 9 m. 17, PL-00 185 Warszawa
Portugalio : Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26, 2° p., P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 Republica di San Marino
Sud-Afriko : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen
Sud-Koreujo : So Gil Su-Sodemun, P.K. 59, Seŭlo
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016

FIMEM : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

ICEM : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

EC : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

EEC : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

IKS : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KSM : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

Kontribuajoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

Kiom da novaj membroj vi varbis?